

Biblia Revuo



**Numero 4
1995**

**Redaktoro: Donald Broadribb
Melburno, Aŭstralio**

Ĉi tiu teksto de *Biblia Revuo 43* estis preparita per la optika signo-programo ABBYY FINEREADER EXPRESS laŭ ekzemplero de la originala numero aperinta en 1965.

Enhavo de ĉi tiu numero:
La tuta numero konsistas el unu librolonga studo verkita
de Donald Broadribb pri
La Epistolo al la Romanoj

LA EPISTOLO AL LA ROMANOJ

de Donald Broadribb

Enkonduko

La plej longa verko de Paŭlo estas la Epistolo al la Romanoj. Probable ne estus vere, se mi dirus ke en Romanoj ni trovas la tutan pensaron de Paŭlo, sed la verko ja mencias preskaŭ ĉiun temon troveblan en la aliaj leteroj. Sed la ĉeftemo de Romanoj estas la juda problemo.

Kristanismo komenciĝis en hebrea Palestino, kaj estis movado interne de la juda eklezio. Kiel ni baldaŭ vidos, kvankam oni kutime ne uzas la vorton “eklezio” tiel, ĝi estas uzinda termino por Judismo. Post nemultaj jaroj, Kristanismo komencis diskoniĝi ekster Palestino kaj (tre grave) ekster Judismo. La juda vidpunkto neevitebla en la unuaj kristanoj nun montriĝis dubinda. Tute ne lasta inter la debatantoj pri tio estis Paŭlo, kiu insistis pri Kristanismo aparta de Judismo.

Ne estas eble scii precize kiam Paŭlo verkis sian Epistolon al la Romanoj. Kutime oni supozas ke li verkis ĝin nelonge antaŭ la lasta vojaĝo al Jerusalemo.¹ Tiun supozon oni akiras per lego de ĉapitroj 15 kaj 16 de la letero. Se la supozo estas ĝusta, do la Epistolo al la Romanoj estas la lasta de la gravaj leteroj de Paŭlo, kaj probable la lasta de la aŭtentikaj leteroj. Sed ne ĉiu estas konvinkita pri la aŭtentikeco de ĉapitroj 15 kaj 16. La kronologio kaj veturplano de Paŭlo en la Agoj de la Apostoloj havas mankojn kiam ni ekzamenas la lastajn jarojn de Paŭlo, tiel ke konkludo farita surbaze de ili ne estas nepre fidinda. Do ni ne povas certi pri la kariero de Paŭlo en la tempo kiam li verkis la leteron.

Romanoj ne estas letero, laŭ modernaj konceptoj. Ĝi estas tro longa, kaj enhavas preskaŭ neniun personan mencion (se ni ignoras la dubindajn ĉapitrojn 15 kaj 16). Ĝi estus

sendebla al iu ajn frua kristana kongregacio kiu sentis la problemon pri nejudaj membroj. Kelkaj manuskriptoj kaj fruaj citoj ne mencias Romon en versoj 1:7 kaj 1:15, sed ili ne estas sufiĉe gravaj por okazigi dubon pri la originala celo de la letero.

Por kompreni la judan problemon ni devas rigardi la originon mem de la kristana movado.

La kristana movado fontis en la kariero de Jesuo en la frua parto de la unua jarcento. Bedaŭrige, ni havas neniun tiutempan raporton pri precize kion faris kaj diris Jesuo. Nia scio pri li venas en la formo de la kvar evangelioj, verkitaj inter 35 kaj 90 jaroj post la morto de Jesuo. 35 jaroj estas longa periodo. En Palestino, temis pri 35 eventoplenaj jaroj. Gravaj inter ili estis la jaroj de la juda revolucio, kiu komenciĝis en 66 kaj finiĝis en 70 kiam la roma armeo detruis Jerusalemon.² Kiam verkiĝis la unua evangelio (Marko), granda nombro da kristanoj loĝis ekster Palestino. La tradicioj pri la vivo kaj agado de Jesuo ne vere aperas fidindaj, sed ili estas la sola materialo havata.

Laŭ la priskribo en la evangelioj, Jesuo dediĉis sian laboron preskaŭ sole al hebreoj. Ni trovas aludon fojfoje ke romanoj aŭ aliaj personoj estis akceptataj de li, sed ili ŝajnas esceptaj.³ La evangelioj ankaŭ raportas ke Jesuo ordonis al siaj disĉiploj ke ili laboru inter nehebreoj.⁴ Ni povas dubi la historian valoron de tiuj tradicioj. Ili ĉefe aperas kiel instruoj de la releviĝinta Kristo, t.e. de Jesuo post sia morto. Tio estas interpretebla kiel simpla diro ke nur post la morto de Jesuo oni ekkomprenis ke oni devas prediki ankaŭ al nejudoj. La leviĝo de Jesuo estas diskutota, kaj ni flankenmetu ĝin nunmomente.

Laŭ Agoj, Jerusalemo estis la centro de la movado fondita de Jesuo, post ties morto. Kvankam la estroj devis kelkfoje fuĝi el Jerusalemo, ili neniam forestis permanente.

La jerusalema kongregacio speciale rolas en la leteroj de Paŭlo. (Ofte ni legas ke monon li kolektas por helpi la jerusaleman grupon. La leteroj de Paŭlo konfirmas la bildon troveblan en Agoj, ke Jerusalemo restis la centro de la movado. Sekve, la kristana movado restis plejparte en judaj manoj dum la tuta kariero de Paŭlo.

Sed Judismo tute ne estis unusola grupo. Ĝin dividis lingvo kaj kredoj.

La unua grava divido en Judismo montriĝas per la lingvoj uzitaj. Eĉ en Palestino mem kaj la arama kaj la greka lingvoj estis popularaj. Multaj palestinanoj probable estis dulingvaj. Paŭlon montras Agoj kiel fluan en ambaŭ lingvoj.⁵

Jesuo mem probable parolis ambaŭ. La evangelioj ne mencias la problemon, sed ja raportas tri aramajn frazojn el la buŝo de Jesuo: *talitha kum, effatha*, kaj *eli, eli, lema sabah-thani*.⁶ La lasta, tamen, estas cito el la psalmoj,⁷ kaj ne nepre indikas ke Jesuo parolis la araman lingvon. Estas interese noti ke, laŭ la raportoj en la evangelioj, apudstarantoj ne povis kompreni la vortojn de Jesuo kiam li citis la psalmon.⁸ Ĉar la Evangelio laŭ Marko, el kiu venas la tri citoj aramaj, speciale emfazas la lingvon per tia konservado en greklingva kunteksto, ni povas konkludi ke laŭ la aŭtoro la arama parolado de Jesuo estis iel nekutima. Tiun konkludon helpas la bildo donata pri Jesuo konversacianta libere kun la romaj administraciistoj.

En la epoko de Jesuo la greka lingvo estis la *lingua franca* de la roma imperio. Grekaj sklavoj estis importataj por eduki infanojn, kaj la greka literaturo estis alte respektata. En la plej frua kristana Eklezio greke parolantaj judoj grave rolis. Laŭ Agoj, por certigi ke oni egale traktas ilin, oni kreis specialan administracian oficon.⁸

Malantaŭ la lingva divido estis longa historio. Judismo kreskis el la kulturo de hebrea Palestino dum la epoko de la reĝoj. Ĉ. 1000 a.K. nacia monarkio ekaperis en Palestino. Ĝi daŭris dum la regnoj de nur tri reĝoj, kaj suferis preskaŭ konstantan revoluciadon. Fine la nacio fendigis por formi du naciojn, Izraelo (poste nomita Samario, laŭ la ĉefurbo) kaj Judujo. En 721 a.K. Izraelon konkeris armeoj el Mesopotamio, kaj 27290 altklasanoj estis ekzilataj al Mesopotamio.⁹ Tiuj hebreoj devis lerni la lingvon kaj la kulturon de la nova patrolando. Simila situacio okazis denove, nur jarcenton poste, kiam en 597 kaj 586 Judujon konkeris mesopotamiaj armeoj, kiuj ekzilis la altan klason, 4600 homojn.¹⁰ Kvankam idoj de tiuj ekzilanoj restarigis la detruitan urbon Jerusalemo, granda nombro restis ekster Palestino. Ilia lingvo unue estis la arama, sed poste greka kiam Aleksandro la Granda konkeris la teritorion. La verkojn en la Malnova Testamento oni tradukis greken kaj suplementis eĉ kiam oni ne plu multe ŝanĝis la tekston de la hebrea kaj arama partoj de la Biblio.

Hebreoj ekster Palestino neeviteble fariĝis kulture diferencaj de tiuj en Palestino. Ilia religio simile diferenciĝis. En 621 a.K. oficiale decidiĝis ke nur unu aŭtorizata centro por adoro estas permesata, la nacia templo.¹¹ Por judoj tiu templo estis en Jerusalemo. Ĉar Jerusalemo estis la politika ĉefurbo de la nacio, aŭtorizo de nur tiu templo havis politikan motivaĵon kaj ne nur religian. Izraelanoj ne povis akcepti la politikan suzerenecon kiun necesigus akcepto je la jerusalema templo. Tial, oni aparte establis ador-templo(j)n en Izraelo. En la epoko de Jesuo, la templo sur Monto Gerizim restis la nacia religia centro por la lando tiutempe nomata Samario.

Simile al la aliaj riligoj de tiu epoko, la hebrea religio en Palestino emfazis oferojn. La tradicio postulis ke oni faru oferojn nur en aŭtorizita templo. Efektive, judaj temploj ja ekzistis ekster Palestino, fojfoje, ekz. ĉe Elephantine kaj Leontopolis en Egipto. Sed ili estis esceptoj rilate al la

ĝenerala vidpunkto juda. Frontate de la dilemo: kiel adori en fremda lando, oni evoluigis specialan ador-formon, kiu okazas en sinagogoj. La frua historio de sinagogoj estas tute nekonata, sed antaŭ la tempo de Jesuo ili fariĝis popularaj ekster kaj en Palestino. La sinagogo konkuris kontraŭ la templo. Ĝi estis kunveno por adoro, sen pastroj kaj sen oferoj.¹² En la epoko de Jesuo la sinagog-kunvenoj ŝajne ankoraŭ estis relative neformalaj. Kio nin plej atentigas estas ke sinagogoj ekster Palestino estis popularaj ankaŭ inter nehebreoj. Judismo estis populara religio, populara "filozofio."¹³

Ni povas trovi tri faktorojn kiuj kaŭzis la popularecon de judismo inter nehebreoj. 1) La etik-instruo de Judismo atingis tre altan nivelon, eble egalatan nur de la instruoj de Platono. 2) En la epoko de Jesuo, Judismo estis rigore monoteista, kaj havis filozofian teologion kiu estis tre alloga por intelektuloj.¹⁴ La problemoj pri bono kaj malbono, pri diversaj potencoj en la kosmo, kaj la karaktero de la homo solviĝis sen la kruda kaj malmoderna politeismo de la antikva epoko, kaj sen la senpersona panteisma koncepto de multaj filozofioj. 3) Fine, la dio de Judismo estis persona Dio, ne nur malvarma forto.

Tiuj tri faktoroj kombinite faris el Judismo fortan, allogan potencon. Alta etiko, monoteismo, kaj persona Dio kiun oni povas kontakti estis alloga kombinaĵo kiu sukcesis altiri multajn nejudojn al la sinagogoj. Oni klopodis fari el ili verajn konvertitojn,¹⁵ sed por multaj el ili la maloportuneco de plena konvertiĝo estis pli granda ol la allogo. Cirkumcido, reguloj pri manĝado, mondonacoj por subteni la jerusalem-an templon, strangaj seks-kutimoj, kaj aliaj tradicioj judaj povis mallogi konvertiĝemajn personojn. Do multajn konvertigis partopreni en la adorado sen fariĝi judoj. Ni renkontas ilin en kaj ekster Palestino, en la Nova Testamento.¹⁶

Do ni trovas interesan situacion. Ekzistis forta ksenofobio inter multaj judoj¹⁷ dum aliaj estis tre amikaj al la “pagana nejudoj.” Paŭlo kutime iris unue al la sinagogo, kiam li venis al nova urbo, por prelegi al la judaj kaj nejudaj adorantoj. Konsekvence, nejudoj akompanis judojn jam tuj en liaj kongregacioj.¹⁸ Jen la situacio en la roma kongregacio al kiu Paŭlo sendis sian leteron.

Aliaj dividoj en Judismo ekzistis kaj estis gravaj, sed ili ne rolas en studo pri Paŭlo. Mi tamen menciis ke kelkaj tre malamikaj judaj sektoj ekzistis. La ĉefaj estis la Fariseoj, kaj Sadukeoj, kaj la Esenoj. Paŭlo estis Fariseo.

En nia epoko ni kutime pensas pri Kristanismo kiel pri religio. Laŭ nia opinio, oni ne povas samtempe esti Budhano, Islamano, Judo, aŭ cet. kaj ankaŭ Kristano. Tio estas la rezulto de historiaj eventoj kaj la kresko de teologio dum la pasintaj 1800 jaroj. Sed en la epoko de Paŭlo Kristanismo eĉ ne havis nomon. Por la unuaj kristanoj, ĝi estis nur sekto juda.

Paŭlo konvinkigis ke oni ne devas esti judo por esti kristano. Tio, supozata de ĉiu el ni, estis revolucia koncepto por la frua eklezio. Ĝi ŝajne malakordis kun instruoj de Jesuo mem,¹⁹ kaj oni malfacile povis kompreni kian signifon havus Kristo ekster la juda movado. Laŭ Agoj, la ekleziestroj en Jerusalemo akceptis la teorion ke nejudoj povas esti membroj, sed ili plu opiniis ke *bona* kristano devas esti juda. Paŭlo konfirmas tiun bildon pri eĉ la plej aŭtoritataj estroj.²⁰

Post la juda ribelo en 66-70 p.K., kreskanta nombro da kristanoj estis ne-judoj. Eĉ la judaj konvertitoj, laŭ la romaj leĝoj, ne plu rajtis praktikadi siajn kutimojn judajn. La instruo de Paŭlo donis vojon kiun la eklezio povis sekvi por transiri de la stato de juda sekto al tiu de sendependa religio. La detalojn de tiu instruo ni studas en la Letero al la Romanoj.

Ni posedas neniun informon pri la kaŭzoj kiuj motivigis la verkadon de la Letero al la Romanoj. Sed ni povas fari fideblan konjekton.

Paŭlo neniam estis en Romo antaŭ ol verki la leteron, kaj neniam kontaktis la kristanan grupon tie. La kristana kongregacio en Romo sendube estis fondita de alia persono. Ni povas konkludi, per mencioj en la letero, ke la kongregacio estis preskaŭ tute juda. Ni povus, do, konjekti ke judaj kristanoj iris al Romo dum la tre fruaj jaroj de la eklezio. Tio estus natura afero, ĉar Romo estis la ĉefurbo de la mondo en tiu epoko. Ili fondis kristanan kongregacion, kiu evidente floris.

Post la komenco de la kariero de Paŭlo, nejudaj konvertitoj multiĝis en la eklezio, speciale en Anatolio kaj Grekujo. Iom post iom tiuj nejudaj konvertitoj komencis aperi en Romo, veninte kiel turistoj, negociistoj, aŭ alikaŭze. Komprenoble ili volis konatiĝi kun la kristana kongregacio en tiu urbo. La membroj de la kongregacio, alarmite, probable enketis por trovi kiu permesis ke tiuj nejudoj kristaniĝu. Ili poste skribis al Paŭlo petante eksplikon. Paŭlo, responde, verkis sian leteron. La letero celis indiki la kialon kiu motivigis lian akcepton de nejudoj en la kristanan movadon.

La temo kaj celo de la letero, do, estas diskuto pri la rilato de Judismo al Kristanismo; pli precize, diskuto pri la kialo ne postuli judecon de ĉiu kristano. Paŭlo ne celas diskuti la signifon aŭ celon de kristaneco, tio estas nur akcesora temo. Li supozas ke la legantoj estas kristanoj kaj bone konas la detalojn de la kristana religio. Tial, multaj temoj kiuj tre interesus nin estas preterpasataj aŭ eĉ plene ignorataj.

Legante Romanojn ni devas memori ĝian celon. Mi nun parolu mallonge pri la bildo donata de Agoj. Plurfoje mi bezonos mencii malkongruecon inter la enhavo de Agoj kaj la

deklaroj de Paŭlo. Ekzemple: kiam Agoj diskutas la alvenon de Paŭlo en Romon je proks. 60 p.K., ĝi deklaras ke la juda grupo tie tute ne konis lian nomon. La grupo ankaŭ tute ne konas la karakteron de kristanismo, sed nur per onidiro scias ke ĝi ekzistas. Efektive, Agoj eĉ ne per unu vorto indikas ke jam ekzistis kristana kongregacio en Romo antaŭ ol alvenis Paŭlo. Ŝajne la aŭtoro de Agoj volas supozigi ke Paŭlo mem fondis la kongregacion tie. Kvankam plurfoje en la priskribo de la kariero de Paŭlo Agoj pli-malpli bone akordas kun la informoj donitaj de Paŭlo en siaj leteroj, estas klare ke ni ne povas apogi nin sur ĝi se ni volas lerni detalojn. Ni devas esti iom skeptikaj pri la fidindeco de “faktoj” el Agoj, kiam ni volas per ili suplementi la leterojn de Paŭlo.

Romanoj: Ĉapitro 1

Paŭlo komencas per saluto al la membroj de la kristana kongregacio en Romo. Laŭ sia kutimo, li unue laŭdas la grupon, sed tio devas vekti suspekton en ni. Kompensa kritiko ne longe mankos. Ni trovos ĝin klara en ĉapitro 2.

La tuja temo de Paŭlo estas: kia estas kristano? “Ĉar mi ne hontas pri la evangelio; ĉar ĝi estas la potenco de Dio al savo por ĉiu kiu kredas, al la Judoj unue, kaj ankaŭ al la Grekoj.”²¹ Laŭ la vortuzo de Paŭlo, Greko estas iu ajn nejudo.²²

La akra dikotomio inter judo kaj nejudo ĝenas Paŭlon. Lia argumento strebos demonstri ke la dikotomio devus ne ekzisti. Li parolas unue pri la nejudoj. Kvankam judoj estas rite apartaj de la ĝenerala mondo, ili ne havas specialan, apartan pozicion en Kristanismo. Ĉiu kapablas koni Dion. Tragedie, malgraŭ tiu fakto la nejudoj hontinde preferas “idolojn.”

Jam antaŭ la epoko de Paŭlo tio fariĝis kutima argumento.²³ Ĝi restas eĉ en nia tempo, maskita iomete.

Historie, la hebreoj trovis tri-dimensiajn bildojn tre valora inspir-fonto, kiel ni lernas per Reĝoj. Jahŭe mem estis karakterizata kiel “virbovo” (karakterizo ankaŭ uzita en aliaj kulturoj) kaj du virbov-statuoĵ estis en la ĉefpozicio en la Jahŭe-temploj en Izraelo.²⁴

Post la ekzilo okazis forta reago kontraŭ tio. Jahŭe ne nur estas la sola Dio, laŭ la proklamo de 2a Jesaja ĉ. 540a.K, sed li tute ne estas reprezentebla.²⁵ La dioj de la aliaj nacioj estas nur idoloj, senvivaj statuoĵ faritaj el ligno, ŝtono aŭ metalo por trompi naivulojn.

La ikonoklasta reago, kiu por ni estas tipa de Judismo, jam estis firma parto de la tradicio en la epoko de Paŭlo. La moderna formo troveblas en la antagonismo inter Katolikoj kaj Protestantoj. La Katoliko trovas du- kaj tri-dimensiajn simbolojn utilaj kaj eĉ necesaj, ĉar la homa penso ne vivas nur per racio. La Protestanto tremas pro tiu ŝajna malakcepto de la absoluta transcendo de Dio, kaj diras ke ĝi estas nur idolatrio. Lia reago estas eĉ foje esprimata, mem, per tri-dimensia, videbla reprezento.²⁷

La abomeno de Paŭlo pri “idoloĵ” tamen ne havas nur judan fundamenton. Se estus tiel, ni anticipus trovi ke li kondamnas nejudojn tiel severe kiel la hebrea tradicio. Sed ne. Surprize, ni trovos ke lia opinio la nejudoj kapablas proksimiĝi al Dio tiel bone kiel la judo. La ŝlosilo por tio, kaj la kerno de la tuta pensaro de Paŭlo, troveblas en sperto lia.

Antaŭ proksimume 20 jaroj, Paŭlo estis fervora Fariseo, kiu aktive persekutis la novan kristanan movadon. Li ekhavis sperton pri kio ni scias nur per dua-mana raporto verkita almenaŭ 30 jarojn poste:²⁸

Kaj dum li vojaĝis, li alproksimiĝis al Damasko; kaj subite ekbrilegis ĉirkaŭ li lumo el la ĉielo; kaj li falis sur la teron, kaj aŭdis voĉon dirantan al li: “Saŭlo, Saŭlo [= Paŭlo], kial vi

min persekutas?” Kaj li diris: “Kiu vi estas, Sinjoro?” Kaj tiu diris: “Mi estas Jesuo, kiun vi persekutas; sed leviĝu, kaj eniru en la urbon, kaj estos dirite al vi kion vi devas fari”. . . . Kaj Saŭlo leviĝis de la tero; kaj kiam liaj okuloj malfermiĝis, li vidis nenion; . . . Kaj li estis sen vidpovo tri tagojn; kaj ne manĝis, nek trinkis.

Komparo inter tiu raporto kaj la aliaj variantoj klarigas ke la sperto estis persona vizio. Paŭlo mem nur resumas sian sperton dirante ke Jesuo, post sia reviviĝo, aperis unue al diversaj disĉiploj kaj fine al li.²⁹

Por Paŭlo tiu vizio pri Jesuo estis definitiva. Estas vere ke Dion oni ne povas vidi aŭ eĉ reprezenti ekstere. Tiun fundamentan kredon judan Paŭlo adoptis. Sed li ja estas trovebla per interna vizio. Pro tio, Dio estas nepre la inicianto, kaj estas senutile klopodi uzurpi la iniciaton formante bildojn plastikajn.

Efektive, la nejudaj popoloj ne adoris eksterajn objektojn. Ili adoris la naturfortojn manifestiĝantajn en ili.³⁰ Ni dirus, eble pli adekvate, ke ili projekciis sian konscion pri tiuj fortoj sur natur-objektojn, kaj adoris la objektojn en kiuj ŝajne aktivis la fortoj.³¹ La homo ne kapablas vivi sen ia palpebla simbolo pri la nekonebla kiu renkontas lin ĉiunmomente. La centro por la renkonto estas trovenda. Por Paŭlo, vizio servis kiel la koordiniga faktoro en lia psiko. Por Judismo mem, la simbolo estis la profeto Moseo kaj, pli konkrete, la sanktaj skriboj kiujn laŭtradicie li postlasis. Ili servis kiel reprezentoj de Dio. Tio estas, ili preskribas agojn kaj agadon por la plenumado de la vivo, kiuj kaneligas libidon (psikan energion) pozitive.³² La juda “parolata Tora” permesis interagon inter la konscio kaj nekonscio, des pli necesa ĉar jarcentoj pasis inter la kompilado de la skriba Tora kaj la epoko de Paŭlo.³³ (Parolata Tora estas neskribita komentario kaj kompletigo de la skribita Tora = Genezo, Eliro,

Levidoj, Nombroj, Readmono. Oni supozis ke ambaŭ, parolata kaj skribita, originis ĉe Moseo.) Post la epoko de Paŭlo, Kristanoj bezonis simbolon kiu povas funkcii por ili kiel la vizio por Paŭlo aŭ Moseo kaj la Tora por Judismo; ili trovis ĝin, Jesuon apoteozitan.

Paŭlo nun listas la malbonojn manifestajn inter idolatoroj. Kelkaj, ekz. mortigo, envio, ruzo, estas listataj serie sen komento. Sed homoseksualismo (sodomio kaj la ina verzio de tio) estas honorata per relative longa diskuto. Kiel ni vidos plurfoje, seksaj temoj ricevas neanticipeble kaj neracie grandan pritrakton en la pensado de Paŭlo.

En nia epoko ni kutimas kondamni homoseksualismon kaj tralegas la paragrafojn en Romanoj sen atento. Sed en la epoko de Paŭlo homoseksualismo tute ne estis konsiderata kiel perversa. Ne estas klare ke liaj nejudaj legantoj komprenus lian antagonismon. Judaj legantoj, tamen, partoprenus la abomenon kiun sentis Paŭlo.

Antaŭ ol strebi trovi personan influon kiel faktoron en la pensaro de Paŭlo, ni devus zorge ekzameni la kulturon en kiu li edukiĝis. Absoluta malakcepto je homoseksualismo ne estis propraĵo nur de Paŭlo, sed estis ĝenerale kondamnata en Judismo. La Tora malpermesas homoseksualan agadon. Kvankam la kaŭzo de tiu malpermeso jam longe forgesiĝis, religia motivo originale ekzistis kiun ni profitoplene povos ekzameni.

En la klasika (antaŭekzila) Judismo homoseksuala agado estis parto de la religiaj ritoj en la templo en Jerusalemo.³⁴ Tio estis familiara afero ankaŭ en la aliaj indiĝenaj religioj de Palestino. Kiam okazis la reformo en 621 (la "Readmona Reformo" kiam oni promulgis Readmonon kiel parton de la mosea tradicio), tiu agado, konsiderata kiel adoptita el la najbaraj kultoj, probable estis malpermesata.³⁵ Tamen la

malpermeso en Readmono uzas eŭfemismon kies preciza signifo ne estas certa. Post unu aŭ du jarcentoj, kiam oni strebis rekonstrui Jerusalemon kaj reestabli Judismon kiel palestinan religion sur radikale reformulita etika kaj monoteisma fundamento, oni tute klare malpermesis homoseksualan agadon.³⁶ La malpermeso restis, ligita al religia kredo, longe post la malapero de la originalaj motivoj.

Paŭlo probable ne konis la historion antaŭan de la juda malpermeso pri homoseksualismo. Li nur sentis ke ĝi estas abomena; li sorbis la senton el la kulturo en kiu li edukiĝis. Por li ĝi estis tiel evidenta kaj natura kiel la sento ke virino nepre devas vuali sian kapon.³⁷

Tamen, ke oni religie malpermesis homoseksualismon ne sufiĉas por ekspliki la emfazon faratan de Paŭlo. Proksime al la fino de la ĉapitro li montras fortan sintenon rimarkindan: “kiuj, sciante pri la juĝo de Dio ke la farantoj de tiaj agoj meritas morton, ne nur mem faras ilin sed ankaŭ konsentas al la farantoj de ili.”³⁸ Mortpunon postulis la Tora por homoseksualistoj sed ne por praktikantoj de la aliaj malbonoj (esc. murdon). Efektive, nur homoseksualismo estis aprokata en la nejudia socio kiun konis Paŭlo. Esceptante homoseksualismon, la nejudia socio egale severe malaprobis la aliajn malbonagojn kiel Judismo mem. Do kvankam Paŭlo mencias la aliajn agojn, homoseksualismo lin plej ĝenis. Ni memoru tion, ĉar ni povos konekti ĝin kun aliaj priseksaj diskutoj en la letero.

La cito farita de Paŭlo en verso 17 estas neklara en la greka teksto. La greka teksto diras, “kiu estas justa per fido vivos” kaj permesas ke ni komprenu “kiu estas justa per fido” aŭ “per fido vivos.” Ĝi estas el Ĥabakuk 2:4. La originalo pli adekvate tradukiĝus: “la fidelulo trovos vivon pro sia fideleco.” Estas nuanca diferenco inter tio kaj la citita formo de Paŭlo. Ni ne konsideru plu la aferon nun, ĉar

Paŭlo remencios ĝin poste kaj ni tiam ekzamenos ĝin.

Romanoj: Ĉapitro 2

Tre ĝena kaj miskompreniga problemo en la leteroj de Paŭlo estas la vorto “lego.”

De proks. 900 ĝis 400 a.K., la religia tradicio iom post iom formaligis en hebrea Palestino kaj kulminis per la skribita materialo kiun modernaj studentoj nomas la Pentateŭko. La juda tradicio nomas tiun materialon la Tora, kio signifas “instruo”. La tradicio jam frue insistis ke la materialo, en skriba formo, originis ĉe la profeto Moseo, ĉ. 1300 a.K. Modernaj studentoj trovis ke ĝi estis la rezulto de longedaŭra kresko. Ili izolas partojn de la tradicio, nomatajn J, E, D, kaj P. (J ĉ. 850 a.K.; E ĉ. 750; D ĉ. 621; P ĉ. 500-450.)³⁹ Dum la du aŭ tri jarcentoj tuj antaŭ la kristana periodo, oni tradukis la Toran en la grekan lingvon kaj nomis ĝin en tiu lingvo *nomos*. La greka vorto *nomos* estas tradukita “leĝo.” Do la moderna juda tradicio en la naciaj lingvoj nomas la Pentateŭkon la “Leĝo de Moseo.”

La aliaj verkoj en la Malnova Testamento neniam akiris egalan staton inter la hebreoj. Eĉ nun oni distingas en la sinagogoj inter legado laŭ la Tora kaj laŭ la aliaj verkoj. Dum la epoko de Paŭlo la hebreaj grupoj malakordis pri tio. Kelkaj, i.a. la Samarianoj kaj la Sadukeoj, akceptis nur la Toran kiel inspiritan. Aliaj, i.a. la Fariseoj (Paŭlo estis Fariseo) akceptis aliajn verkojn, speciale la Psalmojn.

La skribita Tora ne estis adekvata por la epoko de Paŭlo. La plej fruaj partoj estis kompilitaj kiam Palestino ankoraŭ estis plejparta farma komunumo. Tiutempe monarkio regis la landon. La D-dokumento, de la sepa jarcento a.K., montras ke oni tiam klopodis modernigi la tradicion laŭ la pli nova, urba karaktero de la socio.⁴⁰ La P-dokumento de la kvina jarcento montras preskaŭ radikalajn revizion de la tradicio, por konformigi ĝin al novaj sociaj situacioj kaj la

progreso de la homa menso. Sed post tiu epoko malmulta revizio fariĝis pri la Tora. Por anstataŭi tian revizion, parola interpreto komencis akompani la skribitan tekston de la Tora, por ekspliki kaj modifi la sencon. Fariseaj instruistoj nemulte diferencigis inter la skriba kaj parola formoj de la Tora. Mencion pri la Tora, por ili, signifis mencion pri la skribita teksto laŭ la parola interpreto.

Kiam Paŭlo, do, parolas pri “la Leĝo” li parolas ne pri parlamenta ago sed pri la juda religia tradicio kiun oni opiniis diorigina kaj sekve absolute obeenda. La tradukoj ofte ne plenumas sian devon klarigi la tekston pri tio. Mi uzas, ĉi tie, nur la tradukon Tora por la greka vorto *nomos*, esceptante kiam Paŭlo parolas pri la politika afero kiun ni nomas leĝo.

Paŭlo pluskribas laŭ la sama temo kiel en la antaŭa ĉapitro. Oni scias ke la ĉapitro- kaj vers-divido en niaj Biblioj estas relative moderna afero, kaj ne ekzistis en la originalaj tekstoj.⁴¹

Paŭlo diras ke la judoj egale kulpis pri la malaprobataj agoj. Ke ili posedas skribitajn regulojn ne indikas ke ili plenumas la regulojn. La judo kaj la ne-judo egalas laŭ la vidpunkto de Dio. Ambaŭ egale kapablas plaĉi Dion. Tio estas ĉar ĉiu ajn povas percepti la volon de Dio. Se oni faras malbonon, oni intence malakceptas kion oni opinias ĝusta.

Tiu koncepto estas la rezulto de vidpunkto ne tute familiara nun. Oni nomas ĝin “natura teologio.” Ĝi antaŭsupozas ke Dio estas trovebla per la karaktero de la kosmo mem. La homo estas sensignifa, kompare kun la tuta kosmo (interna kaj ekstera). Sed tiu fakto rezultigas koncepton pri Dio nur per projekcio.

Projekcio estas psikologia fenomeno. Ĝi signifas ke oni konstatas karakterizaĵon en si mem, sed ne konscias ke ĝi

troveblas interne. Anstataŭe, oni kvazaŭ vidas tiun karakterizaĵon en personoj aŭ objektoj aliaj. Aplikate al la nuna temo, diri ke la Di-koncepto rezultas el projekcio signifas ĉi tion:

Ĉiu mio estas konstruita iom post iom, penoplene, el originala nekonscia stato. (Mio = *ego* en la anglalingva psik-analiza terminaro; *das Ich* en la originala germana terminaro.) Tio estas, la persona konscio estas akirata kaj ne akompanas personon jam je ties naskiĝo. Dum la kresko de la infano, ties persona konscio, ties mio, konstruiĝas iom post iom. Kiam oni diras “la homo ne kreis sin mem,” oni faras projekcion. La fundamento de la diro estas, pli precize, “mi ne kreis min,” aŭ, “mi ne kreis mian mion.” Tio estas, mi (la mio) estas kreitaĵo; ia persona potenco kreis min. Tiu persona potenco, laŭ la terminologio projekcia, estas nomata Dio la Kreanto. En la moderna epoko, kiam ni pli-malpli bone scias la biologiajn faktojn, ni limigas tiun kreon al spirita kreo. En la antikva epoko, la projekcio inkludis ankaŭ kreon je la korpo mem. (Multaj religiaj preĝoj, himnoj, kaj konfesoj konservas tiun antikvan vidpunkton en sia lingvouzo.) La ekstera mondo estas bona “portanto” por la projekcio. Kiam oni prosperas, la pozitiva, ama aspekto de Dio estas projekciata. Kiam katastrofoj okazas, la negativa, detrua aspekto aperas.⁴²

La projekcio farata de Paŭlo, ĉi tie kaj aliloke, estas parte rezolvita. Dio efektive konigas sin al ĉiu homo per rekta kontakto kun ties psiko. La vojo al Dio ne estas ekster la homo sed interne de la homo. (Paŭlo uzas ne la vorton *menso* aŭ *psiko*, sed la vorton *koro*. En la antikva lingvouzo, *koro* pli-malpli ekvivalentas al nia vorto *psiko*.) Tiu konvinkigo instigis ke Paŭlo predikadu, ĉar li trovis la vojon kondukantan al Dio. Li parolas pri la orakolo trovebla en la libro Jeremia, orakolo kiun li ofte mencias en siaj leteroj:

Jen venos la tempo, diras Jahŭe, kiam mi faros kun la

*domo de Izrael kaj la domo de Jehuda interligon novan: ne tian kiel la interligo kiun mi faris kun iliaj patroj, en la tago kiam mi prenis ilian manon por elkonduki ilin el la lando egipta, la interligo kiun ili malobeis kvankam mi estis ilia mastro, diras Jahŭe. Sed jen estas la interligo kiun mi faros kun la domo de Izrael post tiu tempo, diras Jahŭe: mi metos mian leĝon en ilian internon, kaj sur ilia koro mi ĝin skribos, kaj mi estos ilia dio, kaj ili estos mia popolo. Kaj ne plu instruos ĉiu sian proksimumon kaj ĉiu sian fraton dirante "Ekkonu Jahŭen," ĉar ĉiuj min konos, de iliaj malgranduloj, ĝis iliaj granduloj, diras Jahŭe. Ĉar mi pardonos iliajn kulpojn, kaj iliajn pekojn mi ne plu memoros.*⁴³

Paŝi de la vidpunkto ke iam Dio estos konata de ĉiu al la vidpunkto ke jam ĉiu konas Dion ne estas longa vojaĝo. Kelkaj partoj de Judismo jam atingis tiun stadion jam antaŭ la epoko de Paŭlo. Ĝi estas elokvente esprimata en la libro Malahî:

*Ĉar de la sunleviĝejo ĝis la sunsubirejo mia nomo estas granda inter la nacioj, kaj sur ĉiu loko oni incensas kaj alportas oferojn al mia nomo, oferojn purajn; ĉar granda estas mia nomo inter la nacioj, diras, Jahŭe.*⁴⁴

Do dirante ke Dio estas konebla ĉie, Paŭlo spegulis aktualan vidpunkton. Ekskluzivismo ne karakterizis lin.

La kutima instruo de Judismo estis ke la Tora estas necesa por saviĝo (akcepto fare de Dio).⁴⁵ Paŭlo ne akceptas tion. Anstataŭe, li diras ke Dio juĝas ĉiun personon laŭ ties individua situacio, ne favorante iun ajn grupon. La persono "sen la Tora" t.e. nejudo, estos juĝata laŭ ties kapablo "fari nature la aferojn de la Tora . . . skribita en iliaj koroj." Sed la persono "kun la Tora," t.e. judo, estos juĝata laŭ ties plenumo de la Tora. "ne la aŭskultantoj de la Tora . . . sed la plenumantoj de la Tora estos pravigataj." Kion signifas "esti pravigata"?

Pravigo estas jura termino. Multaj religiaj vortoj en la klasika juda teologio estis juraj. La plej fruaj historiaj partoj de la Malnova Testamento aludas al antaŭ-monarkia socio. Antaŭ ol establiĝis la monarkio, la hebrea Palestino estis nefirma socio, kun multaj sendependaj urb-ŝtatoj kiuj kune formis amfiktiono(j)n, t.e. federaciojn. La dominanta amfiktiona estro estis la Juĝisto, karisma persono kiu estis religia estro, milita estro, kaj decidanto pri sociaj problemoj.⁴⁷ La religia parolo karakterizis Dion kiel Juĝiston, kaj la rilato inter Dio kaj homoj esprimiĝis per terminoj taŭgaj por tia bildo. Oni estas, kvazaŭe, ekzamenata de la Ĉef-Juĝisto. Se oni malobeas la regulojn de la Interligo, oni kulpas; se oni plenumas ilin, oni estas senkulpa kaj justa. La aktivado de Dio, ties juĝago, estas justeco.⁴⁸

Esti pravigata de Dio signifas esti deklarata senkulpa de la Ĉef-Juĝisto, Dio. Ni devas krome konsideri alian aspekton de la afero, la *ad hoc* karakteron de la decidoj. Neniu parlamenta aŭ sistema leĝaro ekzistis. La socia tradicio estis la fundamento kaj konforme al la tradicio juĝistoj faris decidojn; tradicio estis la ĉeffaktoro.⁴⁹ Do ankaŭ religie, Jahŭen oni konceptis, unue, ne kiel Ĉef-Leĝdonanton sed kiel faranton de *ad hoc* decidoj. Multa materialo en la Tora, poste konsiderata pure diorigina, originis kiel *ad hoc* decidoj faritaj kaj transdonitaj dum la jarcentoj. Almenaŭ teorie, kaj probable praktike, individuo ja kapablas eviti pekojn kaj tial ricevi la verdikton “senkulpa” de Dio.

Post la establiĝo de la monarkio, proks. 1000 a.K., la bildon pri Dio la Juĝisto komencis anstataŭi bildo pri Dio la Reĝo, kaj poste la bildo pri Dio la Patro. Teologiumado pri la morto ankaŭ establis la koncepton ke ekzistas nature en la homo peko kiun la individuo ne kapablas nuligi aŭ eviti.

Sento ke oni pekis estas religia frazo por espjimi senton ke oni kulpas, kaj povas origini diversloke. Kulp sento estas

interna konflikto, kie oni samtempe aprobas kaj malaprobas. Psikologie tio estas parte eksplikata ĉi tiel. Ekzistas en la psiko de normala kreskinta homo supermio (angla terminologio: super-ego). Ĉi tio estas interna akcepto de la postuloj kaj vidpunktoj de la socio, tiel firma akcepto ke ili formas parton de la mio mem. Ĉar postuloj de la socio ofte ekzistas ĉar ili batalas kontraŭ la “naturaj” inklinoj, t.e. la inklinoj de la malkonscio, povas okazi serioza konfliktto en la psiko de la individuo. Se oni ne konscias ke la supermio estas interne, sed projekcias ĝin kaj donas al la projekcio la nomon Dio, kiam oni malobeas la postulojn de la supermio oni sentas ke oni ne nur kulpas socie sed ke oni pekas.⁵⁰

Aldone, la sento pri peko-kulpo povas rezulti pro nekapablo plenumi la postulojn malkonsciajn, t.e. instinktajn, kontentige. Unu tasko de la religio estas provizi kanalojn laŭ kiu povas flui la libido (instinktoj, potencoj de la malkonscio) akcepteblaj.⁵¹ Tio faras firman ligon inter etiko kaj teologio en la religiaj tradicioj. Se oni malsukcesas kanalizati la libidon kontentige kaj plenumi ĝiajn postulojn, la rezulto povas esti konflikto en la psiko kaj kulp-sento rezultas. Tia kulp-sento povas esti nuligata se oni kontentige plenumas ritojn kiuj kanalizas la libidon laŭ akcepteblaj manieroj.

Laŭ tiu vidpunkto, se ni diras ke Dio estas nomo atribuebla al parto de la enhavo de la libido-skemo, la kulp-sento povas nomiĝi pek-sento.

Kvankam Paŭlo projekcias la Di-bildon, li faras tion malpli forte ol en la tradicia teologio hebrea. Du faktoroj eksplikas tion: unue, la epoko kiam li vivis malpli forte favoris la projekcion; due, li spertis superfortan internan eventon. Paŭlo plene kapablis eksterigi la Di-bildon. Ekzemple, li opiniis ke kuracado je malsanuloj estas videbla manifestiĝo de la potenco de Dio. Kelkajn jarojn post Paŭlo, la verkantoj de la Evangelioj povis koncepti ke Jesuo faras miraklojn, ekz. mildigas ŝtormon aŭ marŝas sur akvo, kaj eĉ pretendis ke la

veraj kredantoj povas simile fari miraklojn, ekz. movi montojn. Do, la internigo farata de Paŭlo pri la Di-bildo ne estas tute ŝuldata al la populara vidpunkto de lia epoko.

Definitiva por Paŭlo kaj lia konceptado pri Dio kaj pri Jesuo estis ke li havis internan sperton (la vizion); tiu interna kontakto nuligis la valoron de eksteraj manifestacioj.

Rezulte, por Paŭlo Dio estas nur parte-ekstera figuro. Li estas ankaŭ figuro interne trovebla, "per la spirito," anstataŭ ekstere; tamen li estas aparta persono kaj ne parto de la spertanto mem. Sekve, Paŭlo emfazas la internan aspekton de rilato al Dio, ignorante ĉion alian.

Preskaŭ kaŝita en la diskuto pri la Tora kaj la konscio estas aludo al eterna vivo, kiu baldaŭ montriĝos esti ĉeftemo. Mi detale diskutos ĝin poste.

En la lasta parto de la ĉapitro Paŭlo parolas pri cirkumcido, kiu estas mallonga maniero aludi al la tuta ritaro juda. Cirkumcido, operacio ĥirurgia, tute ne troviĝis nur inter judoj; kaj ne ĉiu judo estis cirkumcidata. (Ĉar ja duono de la judoj estis virinoj.) Sed estas signifoplene ke tiu operacio simbolis la religion mem. Judismo kiel etik-religio ankaŭ estis cirkumcid-religio. Estas malfacile por ni kompreni la emfazon pri tio en la antikva Judismo, sed ni ja kapablas kompreni la ligon inter la klasika etiko, cirkumcido, kaj la Di-figuro.

Penis-cirkumcido estas, kiel oni ofte indikis, i.a. simbola kastrado. Ĝi ankaŭ servas kiel inici-rito religia.⁵² Ekzistas kelka atesto por kredigi ke en fruaj epokoj cirkumcido okazis nur je la tempo de seks-maturiĝo, inter judoj.⁵³ Kio plej gravas por ni estas ke la teologia emfazo pri cirkumcido, kiun ni supozas tipa pri Judismo, estas produkto de la post-ekzila reformacio de la 5a jarcento a.K.

Probable, kiel oni supozas, cirkumcido ja estis antikva,

bone establita socia kutimo de epoko longe antaŭ la 5a jarcento a.K. Sed ĝin oni teologie emfazis, unuafoje, nur en la P-dokumentoj de la Tora kaj en la aliaj postekzilaj verkoj.

La P-dokumenton karakterizas emfazo pri rezigno je seksagoj. Ni jam remarkis ke la kondamno pri homoseksualismo estas en la P-dokumentoj. La sama dokumento unuafoje donas definitivajn regulojn kontraŭ incesto, prostituado, kaj fekundigaj ritoj. Ĝis la ekzila tempo, Jahŭe estis plejparte natur-dio, karakterizata simile al la dioj Baal kaj El en la ugarita mitologio.⁵⁴ Tiun karakterizon plejparte nuligis la verkoj de la postekzila periodo. Seksmotivoj dominas en multaj el la antaŭekzilaj verkoj, ekz. Jeremia kaj Hoŝea, sed postaj verkoj klare distingas inter “vera” religio kaj seksagado,

Rezigno pri seksagado kiel formo de religia adoro akompanis la progreson for de natur-fekundiga religio al la matura teologio kiun ni konas. Antaŭ nur kelkmil jaroj, agrokulturo unue aperis en la mondo, en Palestino je proks. 8000 a.K. 55 Tio estas ligita kun la homa kapablo kanalizati libidon.⁵⁶ La lasta paŝo en la kanalizado de libido, simbolata per cirkumcido, permesis ke la hebreoj kanalizu sian psikan energion alidirekte. Post tre mallonga tempo, nur ĉ. 500 jaroj, oni pretis por la apero de Kristanismo. Kristanismo, siavice, estis kombinita kun la intelekta progreso de la grek-baza kulturo por establi la civilizacion kiun ni nun havas. Paŭlo grave rolis en la formuliĝo de tio.

Kiel ni vidas per studo pri 1 Korintanoj, kvankam Paŭlo malaprobis korpan cirkumcidon, li emfazis la valoron de spirita cirkumcido kaj kun tio la valoron de severa kaj rigora seks-abstinenco. La vidpunkto de Paŭlo kondukas al plena sublimado de la seksinstinktoj, kvankam estas probable ke li mem neniam tute konscie komprenis ke tion celas lia rezonado.

Romanoj: Ĉapitro 3

Kvankam Paŭlo ne opiniis ke la judaj ritoj necesas por

kristano, li ne malakceptis ilin. Kiel dirite pri Agoj, Paŭlo ŝajne restis fidela judo ĝismorte. Li ja asertis ke Judismo ne estas nepre necesa, sed li neniel asertis ke ĝi estas senvalora. Dum sia tuta argumentado, Paŭlo supozas kaj asertas ke la juda Tora estas efektive valora por kristano.⁵⁷

Paŭlo akre dikotomias inter judoj kaj ne-judoj en ĉapitro 3. La fama cito en 3:11-18 estas aplikata de Paŭlo al judoj. Li argumentas ke la Tora ne sufiĉas do estas suplementenda por la judo. La judoj ricevis la orakolojn de Dio (la Tora). Ili estas juĝotaj laŭ tiuj orakoloj. Li akuzas ke ili ne plenumis la postulojn de la Tora. Anstataŭe, ili egale kulpas pri la diversaj misfaroj listitaj en ĉapitro 1.

Kiel ni povas agordigi la ŝajne apartajn motifojn en la pensaro de Paŭlo: ke la homo povas esti akceptata de Dio, kaj ke “ĉiuj pekis” kaj “per la faroj de la Tora neniu karno praviĝos antaŭ li; ĉar per la Tora venas konscio pri peko.”? Jen problemo nur por la racio. Empirie, oni povas konstati ke malgraŭ ĉiu teorio, efektive la homaro nesukcesas plaĉi Dion, eĉ kvankam la teoria idealo estas atingebla. Ke Dio ne estas plaĉata estas pruvata de la morto kiun suferas ĉiu homo, kion ni poste konsideros pli detale.

Laŭ la vidpunkto de Paŭlo, ekzistas malpaco inter la homo kaj Dio. La efekto de la rolo de Kristo estis nuligi tiun malpacon, laŭ la vortoj de Paŭlo: “repacigilo per fido en lia sango por la elmontrado de sia justeco per la pardono de la pekoj.” Por personoj de la moderna mondo la signifo de tiuj vortoj ne estas klara:

Antikvaj religioj emfazis la rolon de oferoj. Unu grava rolo de oferoj estis nuligi la furiozon de Dio. Por modernulo, estas malfacile kompreni kial oni konceptis ke Dio estas furioza, kaj kiel ofero povus nuligi tiun furiozon. Nia propra partiĝo for de la pensmaniero de la antikvaj kulturoj estas

tiel kompleta ke ni apenaŭ komprenas iliajn konceptojn. Tial ni devas fari penon por meti nin en ilian situacion.

La antikva homo ne kapablis regi sian mondon, eĉ pli nekapabla estis la homo ol ni nuntempe povas imagi. Li eĉ ne kapablis mezuri tempopason. Lin trafis ĉiu naturkatastrofo kiu nun afliktas nin (uraganoj, erupcioj de vulkanoj, epidemioj, klimat-ŝanĝoj), kaj multaj katastrofoj kiujn ni nun pli-malpli regas. Incendio, sovaĝaj bestoj, “plagoj” de insektoj, malfekundeco de la tero, kaj homa perforto kune agis tiel ke la nombro da homoj sur la tero estis ĉiam negranda, kaj vivo estis plena de senĉesa timo.⁵⁸ Tiuj influoj plej trafis la homon antikvan, kaj ne estas mirinde ke li uzis por ili la saman vorton kiun ni tradukas “dio.” Nia moderna bildo pri persona Dio, tute aparta de la natura kaj homa mondoj, estas la rezulto de trimiljara evoluo de la homa kulturo, kaj nur lastatempe la scienco trudis ĝin al ni. En antikvaj dokumentoj oni ofte nur malfacile decidas ĉu traduki koncernan vorton “dio,” “potenco,” aŭ “forto.”

Kiel la homo povos vivi en mondo kie ekzistas tiom da neregeblaj kaj evidente vivantaj fortoj?⁵⁹ La respondo troveblas en la fakto ke ili estas evidente vivantaj. Estante vivaj, kiel raciaj homoj ili estas persvadeblaj. Estas vere ke, same kiel homoj, ili suferas senmotivajn furiozadon kaj detruemon, sed ili abrupte ŝanĝas siajn emojn kaj povas iomete sin regi. Por la antikva homo tio ne estis nur filozofio, sed empiria fakto. Ekzemple, konsideru la Riveron Nilo, tre potenca dio en Egipto. Kutime oni povas fidi Nilon. Li leviĝas regule kaj inundas la valon sufiĉe por kreskigi la plantojn. Nur fojfoje Nilo perdas sian paciencon kaj ekkoleras. Tiam, furioze, li decidas dronigi ne nur plantojn sed ankaŭ homojn; aŭ, egale furioza, li decidas rifuzi inundi. Kiam io tia okazas, estas evidente ke oni devas klopodi trovi la kaŭzon de la malplezuro de Nilo, kaj replaĉi lin.

Sed kiel replaĉi lin? Oni povas, kompreneble, strebi vivi

en paco kun la dioj, fari kion ili volas. En la Malnova Testamento tiu vidpunkto ekzistas, kaj oni nomas ĝin Readmona Teologio: se oni prosperas, tio indikas ke Jahŭe estas plaĉata kaj oni bone agas.⁶⁰ Se oni spertas katastrofon, evidente Jahŭe estas malplaĉata kaj oni faras malbonon.

Nuligi misagon, nuligi la malplezuron de dio, estas necesa ago, sed tio ne ĉiam sufiĉas. Eble oni devas fari donacon al la dio. Sed eble oni ne povas trovi la kaŭzon de lia malplezuro. Eble donaco sufiĉas, tiukaze, por nuligi la “neintencitan kulpon.”⁶¹ Tre krude, oni eble povas “subaĉeti” la diojn, plezurigi ilin malgraŭ ilia senmotiva furiozo.⁶²

Konsekvence, per donaco valora, speciale se tre valora, oni povas persvadi la diojn ne plu furiozi kaj denove esti amikaj. Ne ĉiam, kompreneble. Foje ilia furiozo ĉesas nur kiam ili plene venĝas sin kaj detruas la popolon kontraŭ kiu ili furiozis.⁶³ Sed ofte donaco, ofero, utilas.

Jen kiel la antikva homo vidis la mondon, la hebreo ankaŭ, kaj dum krizo la sama vidpunkto ekzistas eĉ inter ni nuntempe, ekz. kiam oni preĝas por venigi pluvon.

En la epoko de Paŭlo tiu “primitiva” koncepto estis malforta, sed ankoraŭ sentata. Speciale en Judismo oni sentis ke Jahŭe estas la persona kaŭzo de natureventoj. La mono-teismo mem kiu dominis Judismon necesigis tion. En aliaj kulturoj, politeista vidpunkto toleris la perdon de kelkaj aŭ eĉ multaj “natur-fortoj” el la dia mondo; tio tute ne nuligis la tutan teologion. Sed en Judismo, kiam oni proklamis la ekziston de nur unu Dio, oni devis pretendi ke Jahŭe mem rekte kaŭzas ĉiun natureventon.⁶⁴ Post tio, oni ne povis distingi inter la multaj aspektoj de Jahŭe. Se oni neis Jahŭen oni samtempe neis la ekziston de ŝtormoj kaj de aliaj naturfortoj, kaj tio evidente estus absurdaĵo. Do ateismo neniam estis serioza minaco kontraŭ la klasika hebrea pensaro. Sed la Di-koncepto restis plena de la natur-aspektoj.

Se ni mem komencus legi la Novan Testamenton tute sen scio pri la historio, ni probable neniel supozus ke Dio estas jam dekomence furioza, kolera, venĝema. La filozofia bildo pri Dio kiun ni havas montras Dion kiel nur pozitivan. “Dio estas amo” estas ne nur cito el la Biblio por la Kristanoj,⁶⁵ sed teologia deklaro. Kial do, ni surprizoplene demandas, oni bezonus repacigi Dion?

Paŭlo heredis la klasikan judan kredon ke fundamente Dio estas kolera, furioza, venĝema dio. Por pacigi Dion oni devas fari oferojn. Jen la sistemo akceptita de la klasika Judismo (malgraŭ skeptika sinteno de multaj personoj⁶⁶), kaj ĝi estis tre forta en la epoko de Paŭlo. Multaj partoj de la Tora, laŭ la tradicio supozata esti de Moseo, konsideras la ĝustan metodon fari oferojn.

La iniciativo en valorigo de ofero estis de Dio, kompreneble. Nia opinio, tio estus neevitebla konkludo. Se ofero estus efika, la natur-katastrofo pro kiu oni faras la oferon ĉesus. Sed, kiel ni scias, neniun konekto efektive ekzistas inter la oferoj kaj la naturaj katastrofoj. Konsekvence, oferoj plej ofte ŝajnis senefikaj, ĉar post la oferoj la katastrofoj ne ĉesis. Se oni personigas la naturfortojn, oni nur povas konkludi ke la dioj malkontentas pri la oferoj. Do, la dioj mem decidas ĉu akcepti oferon. Homo povas bruligi ofere siajn plej valorajn bestojn kaj posedaĵojn, eĉ siajn infanojn, donace al Dio. Per la brulado, la donaco fariĝas fumo kaj povas supreniri al la loko kie loĝas Dio. Sed nenio necesigas ke Dio akceptu la oferojn kaj kontentu. Tion decidas nur Dio, ne la homo. La homo povas strebi kontentigi Dion, sed la homo ne povas kaŭzi la kontentecon de Dio.

Laŭ Paŭlo, la malsukceso de la Tora (kiu estas donita de Dio mem) certigi la kontentecon de Dio estas pruvo ke oferoj ne sufiĉas. La abismo inter homo kaj Dio estas tro granda. Repacigo devas esti faro de Dio, ne de la homo.

En la Judismo de la epoko de Paŭlo ŝanĝoj jam okazis kaj kompleksigis la aferon. Unu grava ŝanĝo estis fordonado de la grupa favore al la individua vidpunkto. Tiun ŝanĝon ni poste konsideros. Teologio farita surbaze de naturkatastrofoj, kiuj afliktas grupojn, ne estas aplikebla senmodife al individuoj. Alia grava ŝanĝo rilatis al la kompreno pri la karaktero de Dio.

La pure sovaĝaj, detruemaj aspektoj de Dio jam estis malakceptataj de Judismo favore al pure pozitiva Di-kompreno, antaŭ la unua jarcento kristana. La negativaj elementoj, kiuj iam estis ĉefmotifo en la kompreno pri Jahŭe, nun estis asignataj al Satano.⁶⁷ Dion oni ne plu povis koncepti kiel faranton de malbono en la mondo. Lia agado estis nur persona puno je individuoj pro ties misagoj, kaj lia fina puno estis morto. Tio akordis kun la jam antikva bildo pri Dio la Juĝisto. La juĝisto verdiktas kaj proklamas la punon.

Konsekvence, la iniciativo de Dio pri pacigo devas esti persona, individua. Ĝi povas okazi por la tuta homaro, sed individuoj devas partopreni ĝin. La iniciativon li faris per ofero farata ne por la homoj sed por Dio mem, la ofero de Jesuo. Paŭlo ne klopodas ekspliki tion nun, sed nur asertas ĝin kiel akceptatan fakton. Sed li poste diskutas ĝin.

La dia favoro, per la ofero, estas donata al ĉiu homo kiu “havas fidon en Jesuo.” La dia favoro estas donata al kiu fidas Jesuon. Denove, Paŭlo ne eksplikas. Li supozas ke ĉiu leganto komprenas la koncepton. Kion celas Paŭlo estas emfazi ke la paciĝo kun Dio dependas ne de la Tora sed de speciala ago farita de Dio. Tio estas ĉar la dio de la judoj estas la dio de ĉiu alia popolo ankaŭ.

Romanoj: Ĉapitro 4

Se la diritaĵoj estas veraj, do kiel la judo superas iun alian? Superecon ni ne konfuzu kun valoro. Posedante la

Toran la judo ne ricevas superecon kiel kristano, sed la Tora konservas sian propran specialan valoron. Tion indikas, iom, la fakto ke la kristana eklezio konservas la Malnovan Testamenton en sia Biblio. Sed, rilate al la Tora, oni konservas ĝin kiel historian dokumenton anstataŭ kiel diajn ordonojn.

La juda argumento povus esti ke ili estas la elektita popolo, al kiu Dio montris specialan favoron. Interese, tiun bildon konservas multaj piaj kristanoj, kvankam Paŭlo sukcese demonstras ke la bildo estas erara interpreto pri la tekstoj.

Genezo donas bildon pri Abraham kiu migris de Mesopotamio al Palestino. Kiam li venis al Palestino, Jahŭe promesis ke lia idaro posedos la terenon eterne.⁶⁸ Tiutempe Abraham ne havis heredonton. Baldaŭ, tamen, li naskigis filon per sia sklavin-edzino Hagar, kaj nomis lin Iŝmael.⁶⁹ 13 jarojn poste Jahŭe denove aperis al Abraham kaj promesis al li novan filon, ĉifoje la patrino estos Sara kiu nun estis pli ol 90jaraĝa. La filo naskiĝis kaj nomiĝis Isaak. Isaakon destinis Jahŭe kiel heredonton de Abraham. Abraham poste mortis, estante 175jaraĝa.

La rakonto montras ke Abraham opinias la tutan aferon tiel nekredebla kiel la moderna leganto. Malgraŭ tio, li akceptas la diron de Jahŭe, kaj laŭ la cito farita de Paŭlo, “ĝi estis kalkulata al li kiel virto.” (La hebrea teksto de la geneza materialo estus pli normale legata: “Li kredis Jahŭen, kaj opiniis ke tio estus mirindaĵo.”) Laŭ la argumento de favoron, la favoro nur estus pago kiun Dio donus al li. Sed laŭ la rakonto Abraham faris nenion speciale laŭdindan. (Paŭlo tre laŭvorte legis la biblian materialon; se la rakonto rakontas neniun agon, do neniuj ago okazis.) Sekve la dia favoro estis donata al li eĉ kvankam li estis “malpiulo,” nur ĉar Abraham akceptis la diron de Jahŭe sen duboj.

Paŭlo denove citas, ĉifoje la komencajn liniojn de Psalmo 32, kun la sama celo. Kunmetante la du citojn, Paŭlo faras ateston por sia argumento el ili, kio estis kutima rabena lertaĵo.

La juda tradicio diris ke Abraham estas la prapatro.⁷⁰ La argumento de Paŭlo sekvas kutimajn rabenajn vojojn: ĉar Abraham ne estis cirkumcidita kiam la dia promeso estis farata al li, li evidente ankoraŭ ne estis judo. Tial, la promesoj al li tute ne rilatas al Judismo. Abraham fidis la diron de Dio, kaj Dio konsekvence akceptis lin eĉ kvankam li ne estis judo. Se li ne estis judo, li estis malpiulo. Do Dio akceptis malpiulon. Estas tre malfacile, por ni, simpatii kun tia argumentado. La kaŭzo estas ke la premisoj de la argumento jam antaŭsupozas la konkludon. Ankaŭ, ni komprenas la historian sencon de la tekstoj. Tamen tio devus ne flankigi nin de kompreno pri la valoro de lia argumento: la tradicio mem kiun oni nomas necesa por dia favoro tamen raportas ke tiu dia favoro foje venas sen obeo al la tradicio.

Laŭ la vidpunkto de Paŭlo pri la teksto, la preteco de Abraham kredi la promeson de Dio estis konsiderata de Dio kiel sufiĉa por ke li donu al li favoron. La situacio estas tiu de rilato inter du personoj. La giganta breĉo inter la homo kaj Dio, fundamenta en la tradicia teologio, ricevis ponton. Tiu emfazo pri persona rilato estas dominanta motivo en la pensaro de Paŭlo, kaj esenca ŝlosilo se ni volas kompreni ĝin.

Romanoj: Ĉapitro 5

Paŭlo nun atingas la specife kristanan kernon de sia komunikaĵo. Li atingis la punkton kie li povis argumenti ke la kerno de kristanismo estas ago ne anticipita en la ortodoksa juda teologio: la morto kaj releviĝo de Jesuo Kristo.

Kristo mortis por pekuloj. Jen unu el la plej malfacile komprenataj partoj de la kristana teologio, ĉefe ĉar ĝi ŝajnas

tute kontraŭracia. Kvankam ja estas kontraŭracia aspekto, tamen multaj problemoj fontas el ŝanĝoj en nia mondbildo okazintaj dum la postaj jarcentoj.

Laŭ la kristana tradicio, Jesuon oni ekzekutis pro ŝtat-perfido. Lin ekzekutis la roma registaro provinca en Palestino. Malantaŭ la kulisoj, la tradicio raportas ke la akuzon pri ŝtat-perfido faris judaj religiaj aŭtoritatuloj kiuj trovis ke la instruado kaj agado de Jesuo ne konkordas kun la publika paco. Post la ekzekuto kaj entombiĝo, Jesuo reaperis al granda nombro da disĉiploj kaj ankaŭ al Paŭlo. Tiu reapero estis pruvo ke Dio ne lasis lin morta, pruvo kiu validos ankaŭ pri la morto de liaj disĉiploj. Ĝis tie ni havas la kontraŭracian parton de la tradicio. Se ni antaŭsupozas tiun tradicion, ĉio alia estas tute racia, kondiĉe ke ni komprenas la rolon de grupa personeco en la antikva Judismo.

Grupa personeco (angle: corporate personality) estas la nomo donata al fenomeno tute familiara ankaŭ en la moderna epoko. Ĝi estas la manko de distingo klara inter la individuo kaj la grupo. Alivorte, ĝi estas sinidentigo kun grupo.⁷¹ Tio estas stadio en la kresko de la mio, kiam la mio ankoraŭ estas malforta. Ni kutime trovas ĝin en junaj infanoj. En la klasika periodo hebrea, ĉ. 1000-500 a.K., grupa sinidentigo estis kutima ankaŭ por plenkreskuloj, kaj apartigo de la mio estis ankoraŭ tre malforta. Tion spegulas la lingvo de la epoko, kiu estas riĉa je kolektivaj substantivoj kaj malriĉa je vortoj por individuoj. Ekzemple, ne ekzistis apartaj terminoj por birdo, ŝafo, aŭ bovo. Se oni bezonis mencii individuon, oni devis uzi ĉirkaŭfrazon: birdar-ido, ŝafar-ido, gebovar-ido. Kvankam ja ekzistis vorto por individua viro, persono, homo, estis "homar-ido" (*ben adam*) aŭ "personar-ido" (*ben enoŝ*). Kiam oni kalkulis ilin, ne necesis uzi pluralon. 50 *iŝ* aŭ 1 *iŝ* (50 homoj, 1 homo). Kiom la lingvo ja spegulas la penskutimojn de popolo estas akre debatata afero. Sed la vortelekto sendube ja indikas ilin.⁷²

La klasika pensaro hebrea ĝuis abstraktaĵojn, grup-konceptojn. Izrael ne estis nur la nomo de nacio, sed ankaŭ la personigita historio de la nacio, ĝia “prapatro.” En la tuta Genezo, naciojn oni traktas kvazaŭ individuajn homojn. Ekzemple, Egipto estas unu el la “nepoj” de Noa.⁷³ Juĝistoj 1 donas al ni tre karakterizajn ekzemplojn:

*Tiam Jehuda diris al sia frato Simeon: Iru kun mi en mian sorton, kaj ni militos la Kanaanido; kaj mi ankaŭ iros kun vi en vian sorton. Kaj Simeon iris kun li.*⁷⁴

Poste en la rakonto la juna frato de Kaleb, Otniel, atakas urbon kaj konkeras ĝin. Li ricevas sian nevinon Aĥsa kiel edzinon. La leganto tute ne suspektus, sen aliaj informoj, ke Kaleb estis ne persono sed ŝtato.⁷⁵

La hebrea religio klasika (antaŭ la 6a jarcento a.K.) estis religio de ne individuoj sed la socio mem. Pro tio oni agnoskis oficiale nur unu ador-centron kiel legitiman. La nacia templo estis parto de la palacaro de la nacia reĝo. Pastroj, nomitaj de la reĝo, faris oferojn.⁷⁶ En la libroj Samuel kaj Reĝoj, el kiuj ni ĉerpas plejparte nian scion pri la klasika periodo, la reĝo mem plene respondecas pri la farto de la nacio. La reĝon, ne la popolo, oni kondamnas pri malpieco aŭ premias pri pieco, kaj la nacio suferas aŭ prosperas konforme.⁷⁷ Normale la reĝon kondamnas la profetoj, aŭ la nacion kiel grupon, kaj ne individuajn civitanojn en la nacio.⁷⁸ Nur ĉe Jehezkel,⁷⁹ en tekstoj verkitaj iom post la 6-jarcenta ekzilo, ni trovas la unuan klaran deklaron pri individua respondeco en religio. Ŝajne eĉ tiam oni plejparte rifuzis akcepti la koncepton:

Kaj aperis al mi vorto de Jahŭe dirante: kial vi uzas ĉe vi en la lando de Izrael ĉi tiun proverbon kaj diras: “La pastroj manĝis nematurajn vinberojn, kaj la dentoj de la filoj agaciĝis”? Kiel mi vivas, diras Jahŭe, la mastro, neniu plu uzos ĉe vi tiun proverbon en Izrael. Jen ĉiuj personoj apartenas al mi: kiel la patro, tiel ankaŭ la filo apartenas

al mi; tiu persono kiu pekas mortos. Sed se iu estas virta kaj agas laŭleĝe kaj juste. . .li certe vivos. . . . Vi diras “Kial filo ne estas punata pro la malbonagoj de la patro?” Vi diras, “Ne ĝusta estas la maniero de agado de la mastro.”⁸⁰

La longa argumento, kiu detale diras la etikajn postulojn de Jahŭe por individuoj, tiel valoris ke oni ripetis ĝin preskaŭ laŭvorte en alia parto de la sama libro. Neaŭtentika interpolaĵo en la libro Jeremia resumas la saman temon.⁸¹

Post tiu tempo la vidpunkto ke oni individue respondecas kreskis konstante, tiel ke Ijob kaj Predikanto povis esti verkataj por debati pri la teologiaj problemoj kiujn vekis la nova vidpunkto.

Unu rakonto en la malnova tradicio estis pri la rilato de la homo kun Dio. Ni nun konas ĝin kiel rakonton pri la Ĝardeno Eden.⁸² En la hebrea teksto la rakonto estas tre simbola. La dio Jahŭe faras plezur-ĝardenon. Li poste formas *Homo sapiens* viran (kiun oni personigas kiel individuan) el la elementoj. Lia kreitaĵo estas malkontenta pro sia soleco, do Jahŭe unue serĉas inter la aliaj bestoj esperante inter ili trovi taŭĝan kunulon por *Homo sapiens*. Ĉar li ne sukcesas trovi tian, li donas dormon al *Homo*; el la flanko de *Homo* li faras kunulon, al kiu li donas la nomon *Vivo*. Al ili Jahŭe donas plenan liberecon en la ĝardeno, kun unu escepto: ekzistas ia “frukto” kiun ili ne rajtas havi, nomita Scio. Trompitaĵo de serpento, kiu promesas ke la frukto Scio faras el homoj diojn, *Vivo* manĝas la frukton kaj donas ĝin ankaŭ al sia kunulo *Homo*. Ambaŭ tuj ekkonscias pri sia nudeco. Kiam oni manĝis la frukton Scio, kiu unu konsekvencon: Jahŭe anticipe diris ke kiu manĝos la frukton ricevos Morton. Jahŭe nun venas kaj lernas la faktojn pri kio okazis. Li timas ke, havante Scion, la paro nun trovos la frukton Senmorteco kaj efektive fariĝos dioj. Li tial elpelas la paron el la ĝardeno

kaj establas gardistojn kun ĉirkaŭturniĝantaj glavformaj flamoj enmane por nebligi ke oni iru al la arbo.

(La postaj tradicioj juda kaj kristana faris el la substantivoj simbolaj de la rakonto nomojn, tiel ke aktualaj tradukoj plejofte ne tradukas la “nomojn.” Homo sapiens = Adam; Vivo = Eva; Plezuro = Eden; Scio = Sciado pri bono kaj malbono — hebrea idiotismo —. El tiuj vortoj, la vorto por Vivo havas arkaikan literumadon; kun tiu escepto, ĉiu el la “nomoj” estas tute ordinara substantivo.)

Aliaj verzioj de la rakonto ekzistis, sed ĉi tiu verzio estas plej populara inter kristanoj.⁸³

Tia mito estas maniero esprimi veron kiun oni instinkte konas. Ĝi rakontas la situacion de la homaro. Ĝi estas verdire simbola. Se ni volas kompreni la sencon, ni devas ne klopodi laŭvorte legi ĝin, laŭ la modernisma metodo de la 19a jarcento. Anstataŭe, ni devas legi ĝin kiel legis ĝin la verkintoj kaj la aliaj antikvaj judoj kaj kristanoj. Por ili, ĝi estis mito esprimanta veron abstraktan.⁸⁴

Paŭlo uzas la miton kiel bazon de kelkaj fundamentaj konkludoj pri Kristo. Tial ni devas kompreni la kolektivitan vidpunkton esprimitan per la mito. Por la diskuto, mi uzas la vorton Homo anstataŭ Adam, ĉar Homo (mallongigo por Homo sapiens) pli signifas zoologian specon por ni ol Adam, kiu sonas kiel nomo de individuo.

Laŭ la mito, Homo ricevas mort-punon pro sia rifuzo konservi sian primitivan situacion. Ĝi preferis anstataŭ tiu situacio Scion, kaj farante tion ĝi trovis ke morto neeviteble sekvas. Estas tre alloge, uzi la modernajn terminojn Konscio aŭ Mio anstataŭ Scio. Laŭ nia maniero paroli, ni dirus ke laŭ la mito la besto Homo sapiens (memoru ke Jahŭe serĉis inter la bestoj supozante tie trovi taŭgan kunulon por li!) ekakiris mion. Tio donis al li konscion kaj kapablon, sed

ankaŭ li ekkonsciis pri la fakto ke ĉiu devas morti. Laŭ la naturo, ĉiu besto mortas, kaj Homo sapiens tute ne estas escepto. Tiun katastrofon oni neniel povas eviti. Laŭ la antikva parolmaniero, tiu katastrofo estas la dia puno kiun oni ne povas eviti. Kompare kun tio, tute sensignifaj estas la peketoj kaj punetoj pri kiuj temas la Tora.

La kerno mem de la kristana evangelio, laŭ la vidpunkto de Paŭlo, estis ke tiu fin-puno, morto, ne plu estas neevitebla. Ĝi ankoraŭ ne mankas: oni ja plu mortas, ankaŭ kristanoj mortas. Sed ĝi ne plu estas timiga, ĉar kvankam mortas la korpo tamen Dio povas redoni vivon. Tio estas demonstrita de la releviĝo de Jesuo. Pro la releviĝo de Kristo ni scias ke ankaŭ ni povas esperi.

Laŭ Paŭlo, la releviĝo de Kristo estis evidenta, ĉar li mem vidis Jesuon, per vizio.

Romanoj: Ĉapitro 6

Kiel ni povas havi tiun esperon? Laŭ kiu metodo ni ricevas tiun dian donacon? Pli frue, Paŭlo uzis la bildon ke la morto de Jesuo estis ofero. Tio estis familiara por ĉiu leganto, juda kaj nejudas. Nun li uzas tute alian bildon, el la mister-kultoj.

Oni multe diskutis la rolon de la mister-kultoj kaj ties rilato al la evoluo de la kristana vidpunkto.⁸⁵ Estas neprobable ke ili estis la origino de la konceptoj de Paŭlo. Ekzistas ankaŭ fundamentaj diferencoj inter la esencaj konceptoj. Sed Paŭlo ja trovis ke la populara mister-teologio estas utila por ekspliki sin.

La mister-religioj originis en Egipto. Laŭ tre frua egipta kredo, la nacia reĝo mem estas la plejsupera dio enkarna. Kvankam estante homo do mortonta, la reĝo spirite estis dia. Kiam lia korpo mortas, lia spirito iras al la senmortaj dioj.

Post kelka tempo oni aplikis tiun koncepton ankaŭ al la nobeluloj. Fine, oni opiniis ke ankaŭ ordinaraĵoj de la lando povas egale diiĝi.⁸⁶ La kosto estis alta, mone kaj psikologie. La Roman Imperion invadis amaso da kultoj tiaspecaj. Laŭ la kultoj, divers-originaĵoj centre rolis. Esenca por la kultoj estis la temo: morto kaj releviĝo.

Mortinta kaj releviĝinta dio tute ne estis nekonata de la hebreoj. Ni scias ke tiaj dioj ekzistis en la mitologio kiu diversforme penetris la tutan antikvan Proksimorienton,⁸⁷ kaj ekzistas atesto ke festo por renovigo de la reĝo ekzistis ĉe la reĝa korto hebrea.⁸⁸ Oni raportas en la Biblio ke la judoj foje adoris mortintan kaj releviĝintan dion, Tamuz, en la Templo de Jerusalemo.⁸⁹ La koncepto pri mortinta kaj releviĝinta dio do estis tute familiara en Palestino. Sed ne ekzistas atesto por indiki ke la hebreoj kredis ke oni povas individue akiri senmortecon per adoro je tiaj dioj.

En la mister-kultoj la iniciiĝanto partoprenas en la reprezentataj morto kaj releviĝo de la dio kaj tiel akiras por sia spirito senmortecon. Paŭlo uzas tiun teologion por ekpliki sian koncepton pri Kristo. Per sia baptiĝo la iniciiĝanta kristano suferas morton kaj renaskiĝas. Se ni memoras ke dum la epoko de Paŭlo bapto okazis per subakviĝo en lago aŭ akvo-fluo natura,⁹⁰ ne per la simbola aspergo familiara nuntempe, tiu rito akiras specialan signifon. Reiro al la akvo kaj leviĝo el ĝi signifas reiron al la origino de vivo kaj nova komenco.⁹¹ Laŭ la hebrea kredo, egale kiel laŭ la greka kaj egipta, la mondo kreiĝis el la akvo.⁹² Tiun kredon spegulas modernaj evolu-teorioj laŭ kiuj marbestoj estis la unuaj vivformoj.

La kondamno donata de dio, morto, do estas evitebla se oni iniciiĝas en la morton kaj releviĝon de Kristo.

Mi jam menciis ke kvankam Paŭlo uzas la popularajn konceptojn de la mister-teologio, ekzistas gravaj diferencoj.

La ĉef-diferencoj por nia studo estas ke en la mister-kultoj dio mortis kaj releviĝis. Paŭlo ne havis tian koncepton.

En la posta kristana teologio tiu distingo malaperis, ĉar la posta teologio proklamis ke Jesuo estis Dio enkarna. Sed tiu vidpunkto ne estas parto de la pensaro de Paŭlo. Laŭ Paŭlo, Jesuo estis normala homo. Jesuo speciale rolis, kiel mesio (kristo), sed tio ne signifas ke li havis dian karakteron. Por kompreni la koncepton de Paŭlo pri la vorto kristo, kaj ĝia aplikebleco al Jesuo, ni devas tre malantaŭeniri en la historion.

La regnoj de la tri reĝoj de la Unuigita Izrael estis epoko de optimismo kaj kreskanta prospero. Tio speciale veras pri la regno de la dua reĝo, David. Post la revolucio kiu apartigis la nacion en du regnojn, malprogreso ekkomenciĝis kaj daŭris preskaŭ senintermite ĝis venkis la asiriaj kaj babiloniaj armeoj la teritorion. Oni ĉiam sopire rigardis al la pasinta "ora epoko" de Reĝo David, kaj sopire rigardis antaŭen kun espero ke la ora epoko revenos. Kiam ĉiu nova reĝo surtroniĝis, esperoj revigliĝis, sed ĉiam fiaskis. De proks. 580 a.K. ĝis proks. 104 a.K. ne ekzistis hebrea reĝo. Denove estis tiel post proks. 63 a.K. Reestabli la oran epokon do signifus reestabli la monarkion mem. Psalmo 2, verkita honore al Alexander Jannes, indikas ke esperoj povis vere grandioziĝi kiam ŝajnis, efemere, ke la monarkio estas reestablita. Tiu politika historio donis al ni la vorton mesio.

La hebrea vorto *maŝiaĥ* estis populare uzata por la reganta reĝo. Ĝi parolas pri la oleumiĝo (dediĉiĝo) de la reĝo fare de la pastroj, kio akompanis la tronigon kiu donas politikan aŭtoritaton. Post transliterumiĝo en la grekan lingvon, de tie en la latinan, kaj el la latina en la modernajn lingvojn, la hebrea vorto *maŝiaĥ* fariĝis nia vorto *mesio*. En la Malnova Testamento oni uzis la vorton por la reĝo reganta aŭ regonta. Tre malofte oni uzis ĝin por la Ĉefpastro, kiu dum nelonga

periodo anstataŭis la monarkion kiel popolreganto. Kiam oni tradukis la materialon de la Malnova Testamento en la grekan lingvon, oni serĉis adekvatan grekan terminon por la hebrea *maŝiaĥ*. Tre rara greka vorto, *ĥristos*, estis elektata, kvankam oni devis forgesi ĝian tradician sencon grekan, kaj tiu vorto iĝis la familiara termino inter greke parolantaj judoj. Tiu vorto, transliterumita en la latinan lingvon kaj el la latina en la modernajn lingvojn, iĝis nia vorto kristo. Kristo kaj mesio, do, estas nur du variantoj de la sama vorto kiu originis en la hebrea lingvo kiel *maŝiaĥ*.

Nenie en la Malnova Testamento tiu termino, aŭ la koncerna persono, havas supernaturan karakteron. Ekzistas neniuj atesto eĉ ke en la epoko de Jesuo la vorto *maŝiaĥ* (aŭ la greka formo, *ĥristos*) havis supernaturan karakteron en iu el la hebreaj sektoj. La mesio estis militema, homa persono kiu estros la nacion dum ties revolucio kontraŭ la reganta Roma Imperio kaj reaŭtonomigos Judujon.

Aparta de tio estis kelkaj aliaj konceptoj, el kiuj nur unu gravas por studi Paŭlon. Tio estas koncepto kiu originis ĉe la profetoj de la Malnova Testamento. Dum la profetoj rigardis la kreskantan malprogreson de la hebreaj nacioj, ili atribuis la katastrofojn kiel punon donatan de Jahŭe. Kiam komenciĝis la ekziloj, la profetoj opiniis ankaŭ ilin puno. Baldaŭ evidentiĝis ke abolicio de ambaŭ nacioj estos neevitebla. Per teologiaj terminoj, la senco de tio estis ke Jahŭe celas detruji siajn regnojn provizore, por repurigi ilin. Se kaj kiam negranda nombro da fideluloj restos post kelkaj jardekoj, Jahŭe reestablos la nacion kaj rekonstruos regnon, regnon puran, sanktan, brilantan ekzemplon por la tuta mondo. Tiu profeta anticipado estis prilaborata dum la jarcentoj ĝis ĝi perdis preskaŭ tute sian mondan karakteron kaj kulmine fariĝis koncepto pri la venonta Regno de Dio. Per dia ago, Dio finos la "ekzilon" (tradicio faris el la pluraj ekziloj bildon pri unu granda ekzilo) kaj rekonstruos la teron. Kiam Reĝo Ciro

ordonis restarigon de Jerusalemo, ĉ. 539 a.K., Dua Jesaja triumfe proklamis ke nun estas inaŭgurata la dia regno, kaj li uzis vortojn kiuj ankoraŭ sonas. Sed la restarigo ne okazis, kaj la Regno pli kaj pli interpretiĝis kiel spirita.⁹³

La tradicio ne postulis ke la Dian Regnon inaŭguru iu specifa persono. Oni supozis, kiam oni anticipis tian regnon, ke la inaŭguro estus de Dio mem. Sed en la lasta epoko antikva, t.e. kiam oni kompletigis la libron Malaĥi, oni anticipis preparanton por la regno, sendotan de Dio. En Malaĥi oni opinias ke tiu preparanto estos la Profeto Elija reveninta.⁹⁴ (Laŭ hebrea legendo, Elija neniam mortis sed viva eniris la ĉielon. 95)

En la pensaro de Paŭlo ŝajne estis kombinitaj la du konceptoj: mesio kaj Regno de Dio. Tia kombino estas facile komprenebla, eĉ kvankam ĝi estas malofta en la dokumentoj de tiu epoko. Mirige, Paŭlo tute ne mencias alian tre influan koncepton, la Filo de Homo, kiu forte rolas en la evangelioj verkitaj post 30 kaj pli da jaroj.

Kombinite, la konceptoj pri mesio kaj Regno de Dio donas tian bildon: Dio inaŭguros dian regnon, kiam li montros kaj akceptigos sian potencon sur la tero. Tiun regnon signos nova estro kiu, kun dia apogo, gvidos la popolon. Laŭ Paŭlo, la mesio estas tute spirita koncepto. La politika aspekto kiu tradicie estis parto nun mankas. Ni vidos ke Paŭlo estis lojala civitano de la Roma Imperio kaj tute ne simpatiis kun la revoluciaj celoj de la judoj en Palestino.

Jesuo estis la mesio. Jen la proklamo de Paŭlo. Kaj Jesuo restas la mesio. Kvankam ekzekutita, Jesuo ricevis novan vivon kaj nun plu vivas. Lin vidis per vizioj liaj disĉiploj kaj Paŭlo mem. Plej grave pri Jesuo la Mesio (Jesuo Kristo) estas ke li ne plu havas materian korpon. La unua homo kiu reakiris vivon post la morto vivas kiel spirito sen korpo. La

regno kiun regas la mesio estas, do, ne monda regno sed spirita. Tion klare demonstras Paŭlo en 1 Korintanoj. Dum sia monda vivo Jesuo faris nenion aplikeblan al la koncepto pri mesio. Konsekvence, laŭ Paŭlo la vivo de Jesuo (se ni esceptas la ekzekuton) estas tiel malgrava ke li eĉ ne mencias ĝin. Sed lia morto kaj reviviĝo signifas ke Jesuon faris mesio Dio.⁹⁶ Mesio, ne laŭ la tradicia politika senco sed laŭ nova spirita senco.

La nekredebla ago de Dio, ke li finis la universalan mortpupon kaj revivigis homon, estas aplikata laŭ egale nekredebla maniero: same kiel la unu homo estis revivigata, tiel ĉiu homo estas revivigebla. Jesuo estis la unua, do estas la mesio kiu inaŭguras la regnon de Dio. Sed ĉiu povas partopreni la agon de Dio kaj fariĝi kolegoj de Jesuo.

Do, laŭ Paŭlo, kvankam li uzas la mister-teologion familiaran en Romo, la kristana proklamo estas alia. La dio de Paŭlo estas la juda dio, Jahŭe. Jahŭe ne mortas nek dormas, Jahŭe ne estas homa. Jahŭe estas eterna kaj nereprezentebla. Jen la plej grava karakterizaĵo de la juda teologio, kiu tre allogis la intelektulojn de la Imperio. Oni ne povas akiri senmortecon per iniciiĝo en dion, malgraŭ la instruoj de la mister-kultoj. Sed la simbolo, iniciiĝo en morton kaj novan vivon, estis utila kaj Paŭlo uzis ĝin kaj donis al ĝi novan signifon. Nun temas pri iniciiĝo en la agon morti kaj ricevi novan vivon akompanante Jesuon, kaj tion ebligas Dio.

Por kompreni la konsekvencojn de tio ni devas konsideri la koncepton kiun celis esprimi Paŭlo. Laŭ la tradicia juda teologio, homo estas moviĝanta korpo, vivanta korpo. En la epoko de Paŭlo, la konservativa sekto juda (la Sadukeoj) konservis la tradician koncepton, troveblan en la Tora, ke la tera vivo aktuala estas la sola ekzisto. Nek anĝeloj, nek spiritoj, nek ĉielo, nek infero ekzistas. Jen importitaj doktrinoj el paganaj kultoj, ne instruataj de la Biblio. La radikala sekto

juda (la Fariseoj) kredis modernisman koncepton pri la vivo post la morto. Releviĝo, kiam Dio redonos vivon al la korpoj de la mortintoj, estis populara koncepto en tiu sekto.⁹⁷ Paŭlo ne detale diskutas la aferon en Romanoj, sed en 1 Korintanoj li uzas multan spacon por ekspliki sian koncepton, kiu estas meze inter la starpunktoj de la Sadukeoj kaj la Fariseoj. Laŭ la vidpunkto de Paŭlo, estas normale ke morto finas ekziston. Sed Dio ŝanĝis naturon, kiam li revivigis Jesuon. Kiu akceptas la estrecon de Dio povas certi ke ili ankaŭ ricevos revivigon. La revivigo estos ne por la korpo materiala, sed por spirita korpo. Sendube la nombro da revivigotaj personoj unuatempe estos malgranda, sed ĝi estas principe senlima. Ĉiu ajn, juda aŭ nejudaj, povas utiligi la oportunun prezentatan de Dio.

Estas notinde ke Paŭlo multe tro interesigis pri la ekzistencialisme gravaj aferoj por filozofadi pri la generacioj antaŭ lia epoko. Multe posta verkanto meditadis pri ĉu Dio donis la oportunon por reviviĝo ankaŭ al la antikvaj herooj.⁹⁸

Uzante modernajn terminojn oni povus reesprimi la argumentojn laŭ psikanalizaj teorioj. Ni povus, ekzemple, akordi kun la Sadukeoj ke la homa individuo formiĝas laŭ genetike heredata skemo, el organikaj kaj neorganikaj materialoj. Ĉar Homo sapiens estas parto de la bestaro, oni devus konkludi ke la dispartiĝo de la organismo kiam ĝi mortas signifas ke la ekzisto de tiu organismo plene finiĝis. (La genetika skemo estus transdonata al novaj individuoj, la idoj, sed tiu genetika skemo estas relative nevariebla, laŭ la vidpunkto aktuala kiu malakceptas la teoriojn de Lamarck.) Ni povas tute ĝuste atribui la "psikon" (psikologian karakteron) ankaŭ al genetikaj faktoroj.⁹⁹

La vidpunkto de la Fariseoj ankaŭ estus reesprimebla uzante modernajn konceptojn: ke la mio estas faktoro kiu ne

obeas la kutimojn. Eble se ni uzas la terminon Memo, laŭ la terminologio de Jung, ni povas diri ke la Memo estas aŭtonomaĵo distingebla de la materialo de la homa korpo. La Memo pluvivas senŝanĝe post la disiĝo de la materiala korpo.

(La Memo estas la hipoteza unueco de la tuta homa psiko. Ĝi inkludas ne nur la mion sed ĉiuj psikaj faktoroj malkonsciaj. En la prastato de la infano enutera, la Memo ekzistas, t.e. neniuj komencis kreski kaj apartiĝi de la malkonscio; kaj en la ideala stato de homo, la mion, kaj la malkonscio harmonie kuniĝas sen perdo de unu aŭ la alia, kaj la Memo estus reestablata. Teorie, se ĉiuj faktoroj en la psiko estus integritaj, la Memo kaj la menso estus sinonimoj. Ĉar multaj el la malkonsciaj faktoroj estas nur konjekteblaj, estus malfacile scii kia estus la Memo se ĝi estus ekzamenebla.)

La vidpunkto de Paŭlo estas radikale malsimila al ambaŭ donitaj vidpunktoj. Li antaŭe proponis la farisean vidpunkton, probable, ĉar laŭdire li ricevis edukon laŭ la farisea tradicio. Iukaze, lia vidpunkto post sia vizio pri Jesuo estis materie malsimila al la farisea vidpunkto. Li nun kredis la sadukean vidpunkton rilate al Homo sapiens ĝenerale. Sed li vidis la Memon kiun ni nomas Jesuo post la disiĝo de la korpo de Jesuo. (Posta kristana teologio, trovebla en la evangelioj, evoluigis la tradicion pri la "malplena tombo" kaj la teorion ke la korpo materia de Jesuo estis ankaŭ revivigata. Ni ne trovas ian spuron pri tia tradicio en la verkoj de Paŭlo. Anstataŭe, li klare neas ke releviĝo de materiala korpo ekzistas, en 1 Korintanoj 15:50.) Oni povus dumaniere ekspliki tion. Oni povus diri ke la psiko de Jesuo spontanee kaj aŭtonome postvivis la morton de lia korpo. Kontraŭ tiu vidpunkto estus alia, ke Dio konservis aŭ redonis vivon al la psiko de Jesuo. Postaj kristanaj generacioj foje preferis la unuan eksplikon.¹⁰⁰ Sed Paŭlo ne konceptis ke la forto kiu kaptis lin estis la psiko de Jesuo, sed alia

forto, Dio.¹⁰¹ Ni nomus tion aŭtonoma komplekso de la malkonscio.

(Komplekso estas grupo de manifestacioj el la malkonscio—kun diversaj eblaj originoj—kiuj kune formas unuon kaj agas rilate al la konscia menso, la mio, kvazaŭ aŭtonoma, aparta persono. Ekstreme oni vidas tion en psikiatraj kazoj de “splita (disigita) personeco”. Vizio, aŭ aliaj psikaj spertoj konsistas esence el la renkonto inter aŭtonoma komplekso kaj la konscia menso, la mio. Laŭ la psikanaliza pritrakto, sperto pri Dio estas identigebla kiel speciala formo de tia renkonto kun aŭtonoma komplekso el la malkonscio.¹⁰²)

La komplekso prezentis sin al lia konscio per vizio, sed oni ne povus diri ke la komplekso konsistas nur el la vizio. Ĝi manifestas sin ankaŭ alimaniere, ekz. per glosolalio.¹⁰³ Parta sinidentigo kun la komplekso instigis la konvinkiĝon de Paŭlo pri senmorteco.¹⁰⁴ Projekcie, senmorteco liaopinie estas donata ankaŭ al aliaj¹⁰⁵ se ili identigas sin kun la komplekso.¹⁰⁶

En ĉi tiu modern - terminologia interpreto mi iom preterpasis la materialon en Romanoj mem por doni integran priskribon. La leganto povas trovi adekvatan liston de referencoj el la aliaj verkoj de Paŭlo, konsultante la notojn por ĉi tiu libro.

Se la spirito de Dio (laŭ la alia terminologio, la aŭtonoma komplekso el la malkonscio) kaptas onin, onia vivo estas tre malsimila al la antaŭa stato. Sed kvankam Paŭlon kaptis tia sperto, li konscias ke aliaj personoj devas strebi kaj peni se ili volas ricevi similan sperton. Ili bezonas volonte doni sin al tia kaptiĝo.¹⁰⁷ Se ili faras tion, peko (konflikto kontraŭ la dia volo) ne plu ekzistas.¹⁰⁸

Romanoj: Ĉapitro 7

Ilustrinte sian diskuton pri Jesuo per la misterteologioj, Paŭlo turnas sin al specife judaj argumentoj. Al moderna leganto estas kvazaŭ li ĵonglas per vortoj, sed por la antikva mondo ekzistis intima ligo inter vortoj kaj objektoj. Se vorto havas du sencojn, oni sentis ke nepre ekzistas natura ligo inter la objektoj signifataj de la vorto.¹⁰⁹ Tiu koncepto plu vivas en modernaj mensoj, kiel scias ĉiu instruisto de lingvoj kiam li klopodas instrui al studentoj. En la Biblio multaj tekstoj dependas de vortĵonglado. Ni jam vidis unu aspekton de tio kiam ni ekzamenis grupan personecon kaj trovis ke la vorto Adam uzeblas samtempe por signifi la tutan homaron kaj ankaŭ specife mitologian figuron. La ĵonglado en Romanoj 7 estas de alia speco.

Ĉar la Tora nomiĝis *nomos* en la greka traduko, la vorto *nomos* havis du sencojn por la judo. Ĝi signifis specife la religian tekston, kaj samtempe signifis kiel klasike en la greka lingvo, “leĝo.” Sur tiu duobla senco Paŭlo konstruas argumenton. Laŭ la sociaj kutimoj, *nomos* (leĝo) validas nur dum vivas la koncernaj personoj. Ekz., leĝo pri geedziĝo validas nur dum ambaŭ personoj plu vivas. Se unu mortas, la alia ne plu estas edzo aŭ edzino. Kiam ni memoras la *ad hoc* karakteron de juro en la antikva mondo, ni komprenas ke tiu estas bona, tipa ekzemplo de leĝo. Laŭ la sama argumento, la juda *nomos* (Tora) estas do valida nur dum vivas la koncernaj personoj. Se, kiel sugestite en la antaŭa ĉapitro, per bapto ni renkontis (spiritan) morton, evidente la Tora ne plu aplikblas al ni. Tial, kristano kiu “mortis” kaj “reviviĝis” per bapto ne plu estas estrata de la *nomos* (leĝo-Tora).

Kial kristano ne volus esti estrata de la Tora? Ĉar ĝi estas la fonto de pekoj? Estante judo, Paŭlo kredis ke la Toran verkis Dio kaj donis Dio al Moseo por transdono al la popolo.¹¹⁰ Li do ne povis supozi ke ĝi estas la kaŭzo de

malbono. Li argumentas alie: kaj li kondukas nin al alia speco de vortĵonglado. Ni jam rimarkis ke la fruaj bildoj pri Jahŭe estis kiel de Juĝisto, en la hebrea koncepto. Krime en la frua antikva mondo difiniĝis per juĝista esploro. Finfine, la juĝisto en la tribunalo decidis ĉu aŭ ne specifa ago estas krime. Ĉar oni konceptis ke Jahŭe estas juĝisto, do Jahŭe ankaŭ deklaras ĉu ago estas krime aŭ legitima. Dum pluraj jarcentoj politiko kaj oficiala religio estis tiel intime ligitaj en la hebreaj regnoj ke la reĝo estris la eklezion kaj la ŝtaton (laŭ niaj terminoj). Tiu praktika aspekto, kombinita kun la teologia bildo pri Jahŭe la juĝisto, nebligis distingon inter “krime” kaj “peko,” kvankam nia opinio ili estas tute apartaj konceptoj. En la Pentateŭko, juraj, kultaj, kaj sociaj reguloj estas sendistinge intermiksitaj, kun legendoj, instruoj, kaj historiaj rakontoj. Konsekvence, la sama hebrea vorto foje estas tradukenda “peko” kaj foje “krime” aŭ “misago.”

Ni nun ekzameni denove la argumenton de Paŭlo. Ago iĝas krime nur kiam la juĝisto proklamas tion. Neniu inhere etika kvalito ekzistas por homa ago, laŭ la klasika koncepto hebrea. Ĉiu ago estas legitima, ĝis juĝisto deklaras ke ĝi estas krime. Ekzemple, plano preni la posedaĵojn de alia persono iĝis krime (peko) nur kiam la nomos tiel difinis ĝin. Ĝis tiam, la ago estis legitima. Post tio, ĝi estis krime kaj punebla.

Sekve la Tora mem devas respondi pri la mortverdikto donata al la tuta homaro de Dio. Se ne ekzistus nomos kondamnanta Adamon (Homo sapiens), la mortpuno ne ekzistus. Por klarigi tion, ni memoru ke la rakonto pri la Ĝardeno Eden estas en la nomos (Tora) mem.

Se ni lasus la argumenton tiel, ni eble dirus ke la Tora estas la origino de malbono. Kial Dio donis Toran, se ĝia sola efiko estas krei krimon? Ĉu tio ne neeviteble konkludigas ke la Tora estas inhere malbona? Paŭlo ne povis

akcepti tion. Li kredis ke la Tora estas la orakoloj de Dio, kaj Dio ne povas voli malbonon. Krome, ne la ago de la Tora kaŭzas la krimadon. La Tora nur difinas ke estas krima ago tio kion oni jam faras.

Pli frue mi menciis ke laŭ la rakonto pri la Ĝardeno Eden, Homo manĝis la frukton Scio kaj tiu ago okazigis la verdikton ke li mortu. Ni nun povas kompreni tion pli profunde. La hebrea esprimo, kiun mi tradukis Scio, estas pli laŭvorte “scio pri bono kaj malbono.” Alivorte, scio distinganta, la sola vera scio laŭ Platono. Tradukite en modernajn terminojn, ĝi diras ke Homo akiris ne nur mion sed ankaŭ supermion (konscion kaj ankaŭ internan kapablon distingi inter bono kaj malbono). Kiam oni scias kio estas bona kaj kio malbona, oni respondecas pri siaj agoj. Pri tio akordas Paŭlo, Platono, kaj la Romkatolika teologio, komune kun la moderna juro. Kiam oni ne kapablas distingi inter bono kaj malbono, oni ne respondecas.

La dua parto de Romanoj 7 estas klare psikologia, tiom ke ni apenaŭ bezonas traduki ĝin per pli modernaj vortoj. Paŭlo konsciis pri divido en li mem. Freŝa, fidela traduko el la greka teksto tre klare montras tion:

Ni scias ke la Tora estas spirita, sed mi estas materia, ruinigita de peko. Mi ne scias kion mi faras. Mi ne faras kion mi volas, mi faras kion mi malamas. Se mi faras kion mi ne volas, jes, mi akordas ke la Tora pravas. Sed ne mi faras tion, sed la peko kiu loĝas interne de mi. Mi scias ke bono ne loĝas en mi, t.e. en mia korpo. Mi povas voli bonon, sed ne fari ĝin. Mi ne faras bonon, kvankam mi volas ĝin. La malbonon kiun mi ne volas mi faras. Se mi faras kion mi ne volas, ne povas esti ke mi faras ĝin sed la peko loĝanta en mi. Do mi trovas ke kutime, eĉ kvankam mi volas fari bonon, nur malbonon mi sukcesas fari. Mia interna persono akordas kun la Tora de Dio, sed mi trovas alian potencon en mia korpo, kiu batalas kontraŭ la potenco

*en mia menso kaj enkarcerigas min en la peka potenco kiu estas en mia korpo. Mi estas sen espero. Kiu povus savi min de ĉi tiu morton veniganta korp?. . . Do mi mem servas la Toran de Dio mense, sed korpe mi servas la potencon peko.*¹¹¹

Al Paŭlo mankis adekvata terminologio. Li klare esprimas ke li sentis du fortojn en si, unu el ili nomiĝas “mi mem” (*autos ego*) kaj la alia estas liadire la korpo. Tamen, la identigo kun lia korpo estas nur metodo esprimi ke li konceptas duan potencon en si, ĉar tiu dua “materia naturo” havas proprajn volon kaj aŭtonomecon. La distingo estas pli-malpli identa kun tiu farata de modernaj analizistoj kiam ili distingas inter la mio (mi, *ego*) kaj la malkonscio. La termino malkonscio inkludas la korpajn faktorojn de la psika vivo, nomitajn *psikojdaj* de Jung¹¹² kiel ankaŭ la “pure mensajn” faktorojn.

Paŭlo vidas sin kiel la lokon de du militantaj partioj. Kvankam lia mio (de kiu la supermio estas parto) strebas plenumi la etikajn postulojn de la Tora, ĝin kontraŭas ĉiupaŝe multe pli forta potenco, la dua personeco (*ho eso anthropos*, “la interna homo”), la malkonscio. Paŭlo personigis la pozitivajn aspektojn de sia malkonscio per la Di-bildo. Li ne ĉiam evitis la tradician kutimon ankaŭ personigi la negativajn aspektojn kiel Satan-bildo, kiel oni vidas en 2 Korintanoj. Sed la Satan-figuro tre malmulte rolas en la pensaro de Paŭlo. Plejparte li plene rezolvis la projekcion kiu konceptigas demonplenan mondon. Li nur parte rezolvis la projekcion kiu konceptigas diplenan mondon.

Kiel indikite de Jung, la malkonscio mem estas tute amorala (t.e. neŭtrala pri moraleco).¹¹³ Sed ni normale renkontas ĝin nur kiam la postuloj de la ekstera mondo rekte kontraŭas la malkonsciajn impulsojn. Se tio ne okazas, neniu konflikto montriĝas kaj ni feliĉe ne rimarkas ke ekzistas

interna “apartiĝo.” Do la malkonscio rekte renkontas nin nur kiam temas pri ĝiaj neakcepteblaj aspektoj. La juda Tora estas unu el la plej honorindaj produktoj de la antikva mondo. La religia tradicio kiu kreskis ĉirkaŭ la Tora, kombinite kun la intelekta tradicio de Grekujo, donis al ni la modernan mondon. La Tora estis unu el la du faktoroj kiuj helpis liberigi la homon de la dominado fare de la malkonscio. Jam en sia esenco ĝi kontraŭas la “naturajn impulsojn,” speciale la seksajn. Ni do devus anticipi ke Paŭlo trovus ke lia menso akordas kun la Tora sed la korpo (lia termino) malakordas.

Kiu, ja, povus savi lin de la konflikto? La respondo: Jesuo.

Romanoj: Ĉapitro 8

Por Paŭlo, Jesuo estis plena pruvo ke solvo al la interna konflikto troveblas. Tuj sekvante la diskuton en ĉapitro 7, Paŭlo parolas pri la rolo de Jesuo. La terminon “korpo” li uzis por signifi la “naturan” parton de la homo, la instinktan karakteron, la ĝio (Freud: *das Es*, germane; *id*, angle), t.e. la instinkta malkonscio. La unua paragrafo de ĉapitro 8 estas malfacile komprenata se oni ne tre zorge legas. Mi tradukas freŝe el la greka:

Ne estas kondamno por la personoj en Kristo Jesuo.¹¹⁴ Ĉar la regado de la vivo-spirito en Kristo Jesuo liberigis min de la regado de peko kaj morto. Kio ne estis ebla por la Tora, malfortigita de la homa naturo, Dio faris sendante sian kunformo nature homa. Li kondamnis natur-pekon, rilate al peko, por doni aprob-verdikton al ni kiuj ne estas gvidataj de naturo sed de spirito. Kiuj sekvas naturon havas naturecajn pensojn, sed kiuj sekvas spiriton havas spiritecajn pensojn. Natureca pensado kondukas al morto, dum spiriteca pensado kondukas al vivo kaj paco, ĉar natureca pensado kontraŭas Dion. Ĝi ne obeas la leĝon de Dio,

*kaj ne povas. Kiuj havas homan naturon ne povas plaĉi Dion. Vi ne estas en naturo, sed en spirito se la dia spirito loĝas en vi. Se iu ne havas la spiriton de Kristo, li ne apartenas al li. Se Kristo estas en vi, sekve nia korpo estas morta pro peko sed via spirito estas viva pro justeco. Se la spirito kiu levis Jesuon el la morto loĝas en vi, do tiu kiu levis Kriston Jesuon el la morto donos vivon ankaŭ al via homa naturo per sia spirito kiu loĝas en vi.*¹¹⁵

Zorga ekzegezo de la teksto estas necesa por kompreni la konceptojn de Paŭlo. En ĉapitro 7 Paŭlo indikis la konflikton internan. Tiu konflikto okazas inter la mio kaj la negativaj aspektoj de la malkonscio. Por simpligi terminologion, mi nomas la negativan malkonscion *thanatos*, uzante terminon adekvatan por la Freud-a teorio.

(Freud klasifis la instinktojn de la malkonscio en du grupojn: Eros, la viv-instinktoj kiuj estas konstruaj; kaj la mort-instinktoj kiuj estas detruaj, foje nomataj Thanatos. La mio kutime identigas sin kun Eros kontraŭ Thanatos. Ĉar la homo nepre mortas, Thanatos ĉiam venkas.)

En la konflikto inter mio kaj Thanatos, Thanatos neeviteble venkas. Nature, la homo devas morti. Tion Paŭlo nomas la “kondamno” aplikata al la tuta homaro. Sed kiu estas “en Jesuo Kristo” estas libera de tiu kondamno. La esprimo “en Kristo Jesuo” estas mallonga maniero diri “iniciiginta en la morton kaj releviĝon de Kristo Jesuo,” t.e. ĝi daŭrigas la mister-teologion de la antaŭa diskuto. La viv-spirito, Eros, Dio, kiu regis en Kristo Jesuo liberigas de la regado de Thanatos. Ĉar Paŭlo identigas spiriton, Dion kaj mion kiel formantajn unu kategorion kontraŭ naturo, peko, kaj Thanatos, li povas fari tian dikotomion.

La Tora, kvankam de dia origino, ne povis levi la homon, pro ties naturo. La Tora nur estas instrukcioj. Kiel ni jam vidis, laŭ la vidpunkto de Paŭlo, oni povas sincere voli

obei la instrukciojn de Dio, sed onia Thanatos malebligas tion. Dio (Eros) savon proponas, sendinte sian filon kiel homon, t.e. ordinaran homon. Kiel povas esti? Pri tio ni iom poste pensos. Nun ni nur rimarku la vidpunkton.

La sekvanta diro estas neklara, greke. Ŝajne la senco estas ke Dio finon donis al Thanatos, tiel ke ni povas ricevi favoran verdikton dum la dia juĝado, se ni ne permesas nin gvidi fare de la potenco de Thanatos, sed fare de la potenco de spirito, t.e. Eros. Menso kaptita de Thanatos estas senespera, sed tiu kiu akceptas Eros certas havi eternan vivon. Thanatos, nature, estas kontraŭ Dio (Eros). Sed se Eros estas la reganto, Thanatos ne povas sukcesi.

“Se Kristo estas en vi...” Pli frue la frazo tekstis “kiuj estas en Kristo Jesuo.” La inversigo de la frazo estas nekutima, ĉe Paŭlo, sed la senco baldaŭ klariĝas. “Se la spirito kiu levis Jesuon el la morto loĝas en vi” estas la senco. Se tiu spirito estas en vi, do kiu levis Kriston Jesuon donos ankaŭ al vi vivon.

La senco, do, resumite estas: ekzistas tri fortoj agantaj en la homo. Unu estas la mio (la konscio), kiun kontraŭas la biologia naturo kiun havas la homo same kiel ĉiu besto kaj kiu laŭ Paŭlo estas plene negativa kaj estas bone nomebla Thanatos. La tria forto estas alia ne-mio-forto kiun Paŭlo nomas Dio aŭ spirito kaj kiun oni bone povus nomi Eros. La mio kaj Eros povas kombiniĝi por venki Thanatos. Unuavide, ŝajnas ke malgraŭ tiu koalicio, Thanatos venkas, ĉar ĉiu homo nepre mortas. Sed ĉar Paŭlo konvinkiĝis ke Jesuo ja mortis korpe sed malgraŭ tio pluvivas, li opiniis ke la koalicio de mio-Eros fine venkos. Kvankam la materia korpo mortos, la “vera mi” povos pluvivi, kondiĉe ke Dio (Eros) ebligas tion.

Tiu duon-psikologia kaj duon-teologia prezento ŝajnas

adekvata por la ĉapitro de Paŭlo. Ĉu aŭ ne ĝi plene kontentigas nin estas alia afero. Laŭ moderna vidpunkto, oni povas plurrilate kritiki ĝin. Laŭ la Freud-a sistemo, oni devus kritiki la identigon de Thanatos kun la normala, heredita naturo dum oni identigas Eros kiel eksteran forton kaj ne ekvilibrigan forton egale troveblan en la normala, heredita naturo. Kiel jam notite, Paŭlo (kiel ĉiu homo) nur parte konscias pri sia ĝio, speciale la negativa. Laŭ la Jung-a sistemo oni ankaŭ kritikis la identigon de Dio kun Eros.¹¹⁶

(Laŭ la Freud-a sistemo, “instinktoj” estis pli-malpli identa kun “natur-fortoj internaj.” Laŭ la Jung-a sistemo, “instinktoj” signifas la etologian koncepton “skemoj de agado.” Laŭ Freud, Eros kaj Thanatos estas instinktoj. Laŭ Jung, ili estas la karaktero montrata en la konscia mondo de la neŭtrala enhavo de la malkonscio. Materialo de la malkonscio povas aspekti pozitiva — Eros — aŭ negativa — Thanatos — laŭ la situacio specifa. La Di-bildo egale povus esti pozitiva — Dio la Patro — aŭ negativa — Satano.)

La vidpunkto de Paŭlo staras inter la historiaj ekstretoj, t.e. inter la antikva kaj la modernaj teorioj. La klasika (antaŭekzila) vidpunkto personigis la tutan malkonscion, kiu estas amoralaj, kiel Jahŭen. Paŭlo personigas parton, la pozitivan (Eros) manifestacion.

La greka teksto de la ĉapitro estas nefacile legata. La interpreto estas tiu kiu plej kongruas kun la vortuzo de Paŭlo. Ĉar mankis al Paŭlo terminologio adekvata, li identigis la fortojn de ia malkonscio kun la korpo, kaj spiriton kun la menso.¹¹⁷ Tio ne estis originala faro lia. Multe pli frue, Aristotelo diris la saman koncepton pli-malpli uzante la samajn vortojn, sed laŭ maniero mirige modernaspekta por ni. Dum la epoko de Paŭlo la koncepto estis tipa stoika koncepto.¹¹⁸ Por ni estas grave kompreni ke en sia verkado Paŭlo uzas la vorton “korpo”, kaj similajn terminojn, kun

psikologia senco. La identigo de seks-agado kun la malaprobataj “naturaj inklinoj” (sama identigo kiel tiu farita de Freud ebligis ke Paŭlo uzu la saman terminon kaj por materia senco (korpo) kaj por psikologia senco (Thanatos).

Nun ni povas kompreni kiel Jesuo solvas la konflikton. Rigore parolante, ni devas diri ke ne Jesuo mem solvas la konflikton sed la dia potenco en li. Tiu sama dia “spirito” kiu revivigis Jesuon povos samon fari por ni. La specifa valoro de Jesuo estas ke li komencis tion por ni. Ni nun povas kompreni la “oferon de Jesuo” menciitan de Paŭlo pli frue. Jesuo identigis sian mion (laŭ nia psiko-teologia terminologio) kun Dio, kun Eros. En koalicio, ili sukcesis postvivi la morton de la korpo de Jesuo, ĉar Paŭlo kredis ke Eros ne estas parto de la homa psiko sed ekstera, aŭtonoma forto. Jesuo donis, oferis sian korpon por efektiviĝi tion. Li devigis sian korpon, kie regas Thanatos, doni sin al Eros. Sed li ne nur oferis sian korpon, li ankaŭ oferis sian mion, identigante sian volon plene kun tiu de Eros. Do fariĝis plena sinifero de Jesuo al Dio. Tio nuligis morton, ĉar morto nur eniris la mondon kiam Homo (Adam) apartigis sian mion de Eros kaj aŭtonomigis ĝin. Konsekvence, Homon kaptis Thanatos (en la rakonto, ĝin simbolis mortiga serpento — bone konata simbolo Freudeca). Paŭlo sciis ke tio okazis pri Jesuo, ĉar per vizio li vidis Jesuon post ties ekzekutiĝo. Neniu konsiderado pli estis necesa.

Se ni identigas nin kun Dio, kun Eros, ni diiĝas. Jen la senco de la frazo “filoj de Dio,” aŭ “infanoj de Dio” en verso 14. La frazo estas kutima idiotismo hebrea, ofte uzita en la Malnova Testamento rilate al la dia koncilio.¹¹⁹ En la antikva mondo, “dia” nur signifis ke iu estas en la spirita mondo, kaj ne estis sinonima kun Dio.¹²⁰ Ni iĝas heredantoj egalaj kun Kristo. Laŭ Paŭlo, potenciale ne estas diferenco inter Jesuo kaj ĉiu alia persono.

Versoj 28-30 multe problemas por legantoj. La ŝlosilo estas la vortoj “ni scias ke por tiuj kiuj amas Dion, por tiuj kiuj estas vokitaj laŭ lia intenco, ĉio kunlaboras al bono. Ĉar kiujn li antaŭkonis, tiujn li antaŭdifinis kiel konformajn al la bildo de lia filo...kaj kiujn li antaŭdifinis, tiujn li ankaŭ vokis.” La normala senco de la vortoj estas ke tiu persono kiu amas Dion ricevas la kooperadon de ties spirito. Tiu konsekvence reformas ilin konforme al la bildo de Kristo. La “antaŭdestinado” temas ne pri ĉu aŭ ne iu persono amos Dion. Estas antaŭdestinite ke tiu kiu ja amas Dion ricevos la karakteron de Kristo. Jen kutima temo en la Nova Testamento. Ekzemplo estas la pia roma soldato Kornelio. Ĉar Kornelio estis pia, Dio instigis ke Petro lin instruu, kaj poste Dio donis al li la Sanktan Spiriton.

La cito en verso 36 estas el Psalmo 44:22 (kat. 43:23). En la Psalmo temas pri deklaro de la suferado kiun havas piuloj, kaj fervora apelacio al Jahŭe ke li “vekiĝu” kaj helpu.

Romanoj: Ĉapitro 9

La juda karaktero evidentiĝas plenforte en ĉi tiu ĉapitro. Se estas vere ke Paŭlon instruis Gamaliel,¹²¹ do Paŭlo bone uzis sian edukon. Paŭlo, kiu tiom strebis por certigi ke kristanoj ne devos akcepti judajn ritojn, mem restis plene juda dum sia tuta vivo.

Laŭ Paŭlo, la Malnova Testamento ne ĉesis esti la orakoloj de Dio nur pro Kristo. La Malnova Testamento restas valida, liaopinie, kaj konservas siajn dipromesojn por la judoj. Li kredis ke Judismo havas specialan rolon. Judoj nature rajtas esti nomataj Filoj de Dio. La Gloro de Dio, esprimo de la Malnova Testamento kun la senco la korpa ĉeesto de Dio,¹²² estas inter la judoj, en la Templo. Ne nur la prapatroj sed la mesio mem estis juda. La judoj kaj ties heredaĵo tute ne estas malakceptataj de Paŭlo. Sed li

insistas ke tiu heredaĵo, kvankam glora, ne donas specialan pozicion al judoj rilate al nejudoj.

Mi menciis jam ia rakonton pri Abraham, diskutante ĉapitron 4. El la idaro de Abraham, du ricevis specialan mencion en la juda tradicio. Ili estis Iŝmael kaj Isaak. Iŝmael estis la unua, sed Jahŭe preferis heredigi Isaakon. Oni opiniis la naskiĝon de Isaak mirakla, pro la maljuneco de Abraham kaj Sara. Kiam Abraham fariĝis 175jaraĝa, li mortis. Lia filo Isaak edzinigis Rebekan estante 40jaraĝa. Liaj unuaj infanoj estis ĝemeloj, Jakob kaj Esav. Antaŭ ol ili naskiĝis, orakolo diris al Rebeka ke la du infanoj estos du nacioj, “unu popolo estos pli forta ol la dua, kaj la pli granda servos la malpli grandan.”¹²³

Paŭlo, rabene, kombinis tiun rakonton kun cito el tute alia fonto, la libro Malaĥi: “Mi ekamis Jakobon kaj Esavon mi malamis.”¹²⁴ Malantaŭ tiu cito estas la grupa personigo tiel familiara en la Malnova Testamento. Esav estis la figur-nomo por la nacio Edom,¹²⁵ kaj Jakob por la nacio Izrael. Rigardante la historion, la aŭtoro de Malaĥi diras ke la katastrofo kiu trafis Edomon estas manifestiĝo de la malamo kiun havas Jahŭe pri tiu nacio.

Sed al Paŭlo mankis la historia konscio kiu karakterizas modernajn biblistudojn. Laŭ li, la citoj estas uzeblaj por montri ke Jahŭe “arbitre” preferis unu personon (aŭ nacion) ol alian.

Laŭ Paŭlo, do, la loĝantoj de Palestino estas idaro de Abraham per Isaak, kaj la lando estis donaco de Jahŭe. Sed kiel ni rimarkis, ne ĉiu infano de Abraham heredis sed nur unu infano, Isaak, kiu efektive ne estis la legitima heredanto. Poste, ne ĉiu infano de Isaak heredis, sed nur unu, kaj denove tiu ne estis la legitima heredanto. Krome, la tradicio diris ke kaj Isaak, Jakob, kaj Esav mirakle naskiĝis. Sekve, la promeso de Jahŭe doniĝis ne nature al legitimaj

heredantoj sed estis supernatura speciala donaco al speciale elektitaj individuoj. Paŭlo volas emfazi la elekton. Se Jahŭe simple promesus landon al Abraham, kaj ties heredanto estus la neniel mirakle naskita filo Iŝmael, la praidaro prave opinius sin privilegia grupo. Sed ĉar heredis speciale naskita infano, kaj la promeso transdoniĝis nur per serio de individuaj, miraklaj agoj, evidente dia favoro ne venas aŭtomate kaj nature sed estas speciala donaco de Dio. Sekve estas vere ke “ne ĉiuj estas Izrael kiuj estas el Izrael (Jakob); nek, ĉar ili estas idoj de Abraham ĉiuj estas filoj.”¹²⁶ Efektive, nur kelkaj el la idaro estas Izrael. Sed Paŭlo ne celas montri nur ke Izrael, Abraham, kaj Jakob ne estas sinonimoj; li celas emfazi ke dia elekto estas la ĉef-faktoro.

Nun Paŭlo argumentas kontraŭ la akuzo ke estus nejuste, se Dio elektus favoratojn arbitre. Lia argumento apogiĝas sur la klasika hebrea vidpunkto ke la kriterio de justeco estas la diro de Dio.¹²⁷ Nek Paŭlo nek la klasika hebrea vidpunkto konceptis absolutan etikan kriterion laŭ kiu oni taksu agojn. Anstataŭe, la vidpunkto estas ke homo estas kreito kaj Dio estas kreanto. La faranto faras kion li volas pri sia faraĵo. Paŭlo klopodas subteni tiun vidpunkton per citoj el la Malnova Testamento.

Laŭ la Tora, Moseon sendis Jahŭe al la reĝo de Egipto. Diversaj katastrofoj trafis la egiptanojn kaj ties reĝon. La katastrofoj okazis ĉar la reĝo rifuzis obei la postulojn de Moseo. Sed estas dirite ke la reĝo rifuzis obei ĉar Jahŭe “obstinigis lian koron,” t.e. malkapabligis lin kompreni. Paŭlo citas el la greka verzio septuaginta anstataŭ el la hebrea originalo,¹²⁸ kie la teksto emfazas ke la potenco de Jahŭe gvidas la agojn de la reĝo.

Tiu aludo al la Eliro malpli imponas por ni ol por Paŭlo. Ni pli inklinas trovi la obstinigon metafora, kaj ni malpli

emus opinii la rakonton historie aŭtentika.

Paŭlo duafoje aludas al la Malnova Testamento, ĉifoje al Jeremia.¹²⁹ Jeremia donas plenumatan parabolon. Li iras al la butiko de potisto kaj observas la laborantan potiston. Unu poto montriĝas difekta. La potisto remuldas la poton. La parabolo estas interpretata kiel bildo pri kiel Dio agas rilate al la homaro. Simila bildo troveblas en Dua Jesaja,¹³⁰ kie la verkanto sugestas ke argila poto ne povas diri al sia farinto “kion vi faras?” aŭ “via poto ne havas tenilon”. La bildo ke Jahŭe estas potisto estas antikva, trovebla eĉ en la frua tradicio egipta.¹³¹

Paŭlo konkludas ke estas pruvite ke Dio rajtas disponi pri sia kreitaro laŭvole. Sekvas la demando: ĉu efektive Dio faris specialan decidon? Por subteni sian pretendon ke Dio ja elektis judojn kaj nejudojn egale, Paŭlo citas denove el la Malnova Testamento. Ĉifoje li citas el Hoŝea. Lerte, li tute inversigas la originalan sencon de la hoŝea teksto.

Hoŝea parolis pri la stato kaj karaktero de Izrael. Li esprimis sin per seksaj terminoj. Dio ordonis ke Hoŝea vivu parabole. Li edzinigu prostituitinon, kiu simbole estas Izrael. Ili naskis infanojn, kiuj ricevis simbolajn nomojn: Jizreel (la nomo de la valo kiu formis naturan limon nordan por Izrael; ĝi estis la loko de multaj bataloj, do bone simbolis venkiĝon de la nacio) por simboli la estontan venkiĝon de Izrael, Ne-kompatata¹³² simbolante la finon de la favoro de Dio, kaj Ne-mia-popolo simbolante ke Jahŭe kondamnos Izraelon. Estas dubinde ĉu la rakonto nun trovebla en Hoŝea havas sian originalan formon. Sed, laŭ la teksto kiun uzis Paŭlo kaj ni mem, Jahŭe fine pentas. Post pluraj jaroj da “puno,” la popolo Izrael estos revokata kaj reakceptata de Jahŭe. La infano antaŭe nomita Ne-mia-popolo ricevos novan nomon, Mia-popolo; kaj la infano iam nomita Ne-kompatata ricevos novan nomon, Kompatata.¹³³

Paŭlo citas izolitan parton de la rakonto, kaj uzas la nomojn kvazaŭ ordinarajn vortojn: “la popolon ne mian mi nomos mia popolo; kaj la neamatinon (hebree: ne kompatata) amatino.” Per tiu izola cito Paŭlo donas al Jahŭe intencon tute inversan de tiu en la originala rakonto. Laŭ Paŭlo, Jahŭe forlasis Izraelon kaj nun elektis aliajn, nejudojn, personojn kiuj estas “popolo ne mia”.

Tia argumentado estas problemo por moderna leganto. Ĝis kiom ni povas serioze konsideri la ideojn de Paŭlo, kiam li apogas sin per tiaj premisoj? Sed ni devas memori ke lia argumento nur uzas pruv-tekstojn. Tio estas, Paŭlo ne derivis siajn konceptojn el citoj malnovtestamentaj. Tute alie. Li unue akiris siajn konceptojn, kaj poste serĉis apog-citojn el la Malnova Testamento. Lia elekto je citoj konformis kun la kutimoj de la epoko. Ni ne permesu ke nia reago kontraŭ la argumenta formo malebligu al ni kompreni lian celon.

Fine de la ĉapitro Paŭlo unuavide ŝajnas diri ke nejudoj povas ricevi dian akcepton sed ne judoj. Sed tion Paŭlo efektive ne celas diri. Li restis konvinkita de la grup-psikologia vidpunkto tradicia en Judismo. Li parolas pri judoj kaj nejudoj, t.e. grupoj. Grupe, la judoj (kiujn li karakterizas kiel volantajn obei la Toran) ne sukcesis akiri dian favoron. Grupe, nejudoj (kiujn li karakterizas kiel ne volantajn obei la Toran) ricevis la proponon de dia favoro. Li emfazas ne individuojn sed grupojn. Individuaj judoj, kompreneble, povas ricevi dian favoron. Ja, Jesuo kaj Paŭlo mem estis judoj. Kaj individuaj nejudoj certe ne aŭtomate ricevas dian favoron.

La bazo de tia argumento estas la malnova, profeta opinio ke Jahŭe forlasis la hebreeojn. La profetaj verkoj, plejparte, aŭguris epokon kiam la malakcepto de Jahŭe ĉesos.¹³⁴ Li tiam refavoros ilin. Sed efektive Jahŭe ne denove montris favoron. Dum la epoko de Paŭlo la hebreeoj ankoraŭ estis malproksime al reaŭtonomiĝo,¹³⁵ kaj la mito ke ili estas

“ekzilitaj” restas eĉ en nia epoko.

Konsekvence, la juda grupo ne plu estis la favorata popolo de Dio, laŭ la profeta tradicio. Paŭlo do havis honorindajn kolegojn kiam li emfazis ke Dio malakceptis Izraelon. Li ankaŭ sekvis la profetan tradicion kiam li emfazis ke Dio montris favoron al nejudoj. Diskutante ĉapitron 2 mi indikis la orakolon en Jeremia kiu antaŭvidas ke iam ne plu ekzistos Tora. La libro Jona, verkita ne longe antaŭ la tempo de Paŭlo (eble 300 a.K.¹³⁶) indikas kiel Dio akceptis nejudan urbon. Malfrua interpolaĵo en Miĥa kaj Jesaja aŭguras ke Jahŭe estos la Dio de multaj nacioj.¹³⁷ Jerusalema ja estos la centro de la gloro de Jahŭe, sed tute ne estas ia indiko ke la specife juda nacio dominos. Kvankam tio estis malforta tradicio, eĉ ne akceptata de la plejmultaj judoj en la epoko de Paŭlo, la temo ja ekzistis.

La lasta cito el la Malnova Testamento estas malfacila. Ĝi ne ekzistas, kun la formo donita de Paŭlo, en la Malnova Testamento. Ŝajne li bazis ĝin sur Jesaja 28:16, miksante la septuagintan kaj hebrean tradiciojn sed enmetante materialon mankantan en ili. La hebrea teksto estas evidente korupta kaj nekomprenebla. La septuaginta teksto nur parte similas al tiu de Paŭlo. La traduko “li” en la lasta linio de verso 33 estas malfacile pravigebla, ĉar normala interpreto de la septuaginta teksto estus “ĝi.”

Paŭlo evidente celas per sia cito diri ke Jesuo estas parto de la juda historio kiu ne estas komprenebla surbaze de la tradicio. Kiu donas sian fidon al Jesuo profitas per tiu ago. La bildo ke Jesuo estas ŝtono kuŝanta sur la vojo por stumbligi estas kutima bildo en la Nova Testamento, uzita ĉ. 25-foje.¹³⁸

Romanoj: Ĉapitro 10

Paŭlo plu uzas sian judisman argumenton, kaj subtenas

sin per citoj el la Malnova Testamento. La teksto de la ĉapitro ne estas adekvate tradukita.

Paŭlo komentas, unue, ke la fervoro mem kiun havas liaj samtempuloj kiam ili strebas trovi Dion emociigas lin. Ĉar malgraŭ siaj penoj ili ne trovas ja ĝustan vojon. “Ĉar nesciante la justecon de Dio, kaj penante starigi sian propran justecon, ili ne subiĝis al la justeco de Dio. Ĉar Kristo estas la fino (aŭ celo) de la Tora, portante justecon al ĉiu kiu fidas.” Li lamente agnoskas ke kvankam oni klopodis sincere trovi Dion, oni ne sukcesis. Li kompatas ilin, ĉar ili ne sukcesas eskapi el sia pure homa naturo.

Ni bezonas zorge ekzameni la sencon de du terminoj ofte trovataj en la verkaro de Paŭlo: justeco kaj fido.

Ni jam ekzamenis la juran sencon de la vorto justeco. (Greke: *dikaioŝune*). Jen heredaĵo el la Malnova Testamento. Ĝi indikas la takson kiun faras juĝisto pri akuzita persono. Li nomas la akuziton “senkulpa” (*dikaioŝ*) aŭ kulpa. Se senkulpa, oni diras ke la akuzito havas justecon (*dikaioŝune*). Do justeco, rilate al persono, signifas ke tiu persono ne kulpas pri io, laŭ la opinio de la juĝisto. La sama vorto aplikata al juĝisto signifas ke li faras verdikton, “faras justecon,” proklamas pri kiu estas justa kaj senkulpa. La duobla senco de la vorto estas tre malfacila por nia kulturo, kaj estas malfacile trovi tradukon kiu indikas ambaŭ sencojn.

Sed neniu grekskribanto povus uzi la vorton *dikaioŝune* sen memoro, konscia aŭ nekonscia, pri la vasta tradicio portata de la vorto. Unu el la plej influoplenaj libroj de la tuta historio, *La Respubliko* de Platono, dediĉis siajn 400 paĝojn al klopodo detale difini *dikaioŝune*. Greke, la vorto havas tute neniel nur religian sencon, nek nur juran sencon. Ĝi karakterizas la vivmanieron de individuo. *Dikaioŝune* estas ĝusta sinteno rilate al la vivo, ĝusta maniero pritrakti realon, “inda vivado.” Religie, kiel en Romanoj, *dikaioŝune* estas la maniero

laŭ kiu homo sintenas al la vivo se li harmonias kun Dio. Ĝi estas fino de la interna konflikto, integriĝo de la psiko laŭ la gvido de Dio. Paŭlon ni povus traduki tiel: “Ĉar ili ne konas Di-bazan integriĝon en si. Anstataŭe, ili strebas agi pure hombaze, do ili efektive ne konsideris Dion. Ĉar Kristo transcendas la tradicion (Tora), kaj donas novan sintenon al ĉiu persono kiu spertas lin.” (Versoj 3-4.)

Paŭlo daŭrigas per teksto kiu ankaŭ ne estas adekvate tradukita. Li diras: “Ĉar Moseo skribis ke se iu faras *Toradikaioŝune*, ‘li ricevas vivon per tio.’” Tio estas, se iu ordigas sian vivon tiel kiel indikas la Tora, li ricevas dian aprobon. La vorto “vivo” havas la sencon “vera vivo,” probable kun nuanco de “eterna vivo.”

Paŭlo probable spegulas la normalan interpreton en tiu epoko. Li ĉerpis la citon el la septuaginta verzio de Levidoj 18:5. La septuaginta verzio diras “Vi devas obei miajn postulojn kaj decidojn kaj plenumi ilin. Se iu plenumas ilin, li ricevas vivon per ili.” Sed la hebrea teksto nur diras “Obeu miajn ordonojn kaj postulojn, kiujn oni devas plenumi kaj efektivigi.” Ne estas filozofia nuanco en la hebrea teksto. Ĝi nur diras ke oni vivu konforme kun la reguloj donitaj de Jahŭe. Paŭlo uzas la tekston tiel ke li donas al ĝi la sencon ke se iu ja obeas la regulojn tiu ricevas premion.

Tio donas al ni la interesan demandon: ĝis kiom la kompreno de Paŭlo pri Judismo intime ligiĝis kun lia propra epoko? Estas klare ke Paŭlo interpretis la bibliajn tekstojn laŭ la kutimoj de la epoko. Ni mem tute malsimile interpretas ilin, kaj vidas ke Judismo estis evoluanta kaj neniel statika fenomeno. Pro tio, ni malfacile komprenas Paŭlon. Ni ne nur devas kompreni liajn vortojn, sed ni devas rekonstrui la sintenon kaj medion de lia epoko. Ni ne povas simple preni Paŭlon el 50 p.K. kaj meti lin en la modernan epokon. Se ni ne komprenas la medion en kiu li vivis, ni neeviteble perfortas la sencon de liaj vortoj.

Paŭlo kontrastas sian komprenon pri la malnovtestamenta koncepto (ke “inda vivado” konsistas el obeado al diaj ordonoj) kun alia koncepto, bazita sur fido. Kio estas fido?

La greka vorto estas *pistis*, de kiu oni faris diversajn verbojn. Nia vorto fido venas el la latina vorto *fides*, kiun oni uzis por traduki la grekan vorton. Por ni estas problemo ke la greka kaj latina vortoj havis plurajn sencojn. Kredo, konfido, kaj fido estas la ĉefaj sencoj. La esenco estas akcepto: oni akceptas la diron, faron, aŭ karakteron de persono. La vorto povas havi futuran senco: oni antaŭakceptas tion kion faros aŭ diros iu. La specifa senco varias laŭ la situacio. Se la leganto scias tion, multa konfuzo malaperas. Unu verkanto eble pensis pri deklaro aŭ instruo. Por li, fido do estas akcepti la deklaron aŭ instruon. Alia verkanto eble pensis pri persono. Por li, fido estas akcepti kion ajn faras tiu persono. Alia verkanto eble pensis pri sperto. Por li, fido signifas akcepti tiun sperton.

Tiu lasta senco estas elstara en la pensaro de Paŭlo. Li ne konis Jesuon, kaj neniun interesiĝon pri la historia vivo de Jesuo montras. Li ja montras scion pri kelkaj tradicioj pri la instruoj de Jesuo, sed li neofte emfazas ilin aŭ diras ke ili gravas. Li spertis Jesuon — Jesuo aperis al li vizie. Ni vidas, ekzamenante 1 Korintanojn, ke Paŭlo ricevis ankaŭ aliajn spertojn kaj li supozis ke ankaŭ la legantoj simile spertis. Laŭ li, do, fido estas akcepti tiajn spertojn.¹³⁹ Kvankam (se ni povas akcepti la raporton en Agoj) Paŭlo unue nevolonte spertis Jesuon, plejparte oni povas okazigi ekstaziajn spertojn. Li diras ke Dio estas ĉiam proksima. Li proklamas ke Dio estas akceptenda. Li diras:

Sed fid-baza dikaiosune signifas tion: ne konsideradu pri “kiu povus supreniri al la ĉielo” (por venigi Kriston), aŭ “kiu povus subiri en la abismon” (por revenigi Kriston el la morto). Anstataŭe, ĝi diras, “Ĝi estas tute proksima, oni

povas trovi ĝin en la buŝo kaj en la menso.” Tio estas, ĝi estas la “fido” kiun ni predikas. Ĉar se vi akordas ke Jesuo estas la mastro, kaj ankaŭ estas konvinkita ke Dio levis lin el la morto, vi estas savita. Via konvinkiĝo okazigas dikaiosune, kaj via akcepto okazigas saviĝon. La Biblio diras, “Neniu kiu fidas lin hontos.” Ne estas diferenco inter judo kaj greko. La sama ulo estas mastro de ĉiu, kun riĉo por ĉiu kiu alvokas lin: “Kiu ajn alvokas la mastro estas savota.”

Eble la plej bona komentario estas la originala teksto, en Readmono:

*La ordono kiun mi donas al vi hodiaŭ:
Ĝi ne estas tro malfacila por vi
ĝi ne estas tre malproksima,
Ĝi ne estas en la ĉielo, por ke vi devu diri
“Kiu povas iri al la ĉielo por venigi ĝin por ni,
por ke ni aŭdu kaj obeu ĝin.”
Ĝi ne estas trans la maro, por ke vi devu diri
“Kiu povas transiri la maron por venigi ĝin por ni,
por ke ni aŭdu kaj obeu ĝin.”
Ĉar ĝi estas tute apud vi,
sur viaj lipoj, en via koro, por ebligi fariĝon.”¹⁴⁰*

Alivorte, vera *dikaiosune*, vivo konforma kun Dio, estas instinkta, ne formulgata per argumentoj aŭ lernata. La kontribuo de Paŭlo estas ke tiu idealisma bildo efektiviĝas kiam oni aldonas Jesuon.

Parto de verso 9 estas ofte citata, “Se vi akordas ke Jesuo estas la mastro, kaj ankaŭ estas konvinkita ke Dio levis lin el la morto, vi estas savita.” Oni sugestis ke tio estis kredkonfeso uzita en la frua eklezio kaj citita de Paŭlo; pri tio tamen mankas atesto.¹⁴¹ Iukaze, ĝin ligas Paŭlo kun la cito el Readmono: “ĉar ĝi estas...sur viaj lipoj, en via koro, por ebligi fariĝon.” La greka teksto de la cito farita de Paŭlo diras laŭvorte, “Se vi akordas per viaj lipoj ... kaj kredas per via

koro. . .vi estos savata.” Por la antikva mondo, la koro estis la kerno de la psiko, kaj la lipoj simbolis paroladon kaj racion. Do la kombino lipoj kaj koro en la cito signifas plenan konvinkiĝon. Paŭlo diras ke Jesuo plenumas la “profetaĵon” de Readmono: saviĝo okazas ĉar Jesuo estas la mastro, Dio levis lin el la morto, se oni akceptas tion.

La akcepto ne povas esti nur intelekta. Nur racia akcepto nenion valoras. La intelekta konvinkiĝo mem ne estas celo sed nur helpilo, sinpreparo por “alvoki” Dion, t.e. akcepti la spirit-influojn.

Tio kompreneble kondukas nin al la demando: kiel akiri intelektan konvinkiĝon. Evidente, oni ne povas konvinkiĝi se oni ne aŭdas. Oni ne povas aŭdi se ne ekzistas instruantoj. Sekve, fido (akcepto) rezultas el mondskala instruado kaj parolado pri Kristo.

Ni abrupte retrovas nin en la mondo de la unua jarcento, per tio. En nia propra epoko ni tute ne supozus ke instruantoj aŭ predikantoj necesas por diskonigi kredon pri sperto. Efektive, ni malfidas tiajn parolajn raportojn. Ni multe pli preferas libron, fotografajon, aŭ televidan raporton, kaj opinias ilin multe pli fidindaj ol nur dua-mane raportita parola deklaro. En la epoko de Paŭlo, la sola praktika maniero diskonigi siajn pensojn estis persone kontakti aliajn homojn. Do, laŭraporte Jesuo instruis studentojn, kiuj siavice instruis aliajn studentojn, kc; kaj Paŭlo strebas ke kiu lin aŭdas siavice diskonigu la vortojn.

Modernaj kristanoj, speciale protestantoj, ne adekvate konsideris tion. La predik-centra diservo, kiu celas doni al la kongregacio informon, aŭ persvadi la aŭskultantojn, estis efika metodo diskonigi informon aŭ kredojn en la unua jarcento. Sed same kiel la universitata kutimo lekcii, ĝi estas anakronismo en la dudeka jarcento.

Paŭlo plu parolas pri judoj. Ni konkludis ke judoj, grupe, ne superas nejudojn laŭ la vidpunkto de Dio. Tio venigas nin al ĉapitro 11.

Romanoj: Ĉapitro 11

Paŭlo prezentas koncepton kiun li jam antaŭe menciis. Tio estas *h̄aris*, greka vorto diversmaniere tradukebla: allogo, senpaga donaco, favoro, dankemo. El la tradukoj eblaj, nur du aplikeblas ĝenerale al la uzo kiun faras Paŭlo: donaco kaj dankemo. (La traduko “graco,” tre kutima, estas nur varianto de “allogo,” kaj konfuzas anstataŭ helpi.) Paŭlo kutime celas la sencon “dankemo” kiam li uzas la vorton pri homa ago; kaj “donaco” kiam li parolas pri dia ago.

Donaco estas spontanea; iukaze, ne pagita aŭ konsiderata kompenso. Ĝi simbolas ies amon aŭ amikecon, aŭ foje klopodon establi amon aŭ amikecon. Kiam Paŭlo parolas pri la *h̄aris* de Dio, li celas paroli pri la klopodo farata de Dio por reestabli konkordon kaj pacon.

Lia argumento estas: judoj, individue, tute ne estas malakceptitaj de Dio. Tute ne, eĉ kiam la Malnova Testamento prezentas tute nigran bildon, Dio certigas al Elija ke ankoraŭ kelkaj personoj ricevas favoron. La profetoj ofte parolas pri “restaĵo,” malgranda nombro da fideluloj kiuj amas Dion. Ankoraŭ ekzistas tiaj personoj, ekz. Paŭlo mem. Li celas diri ke ili ricevas favoron dian ne pro homa agado sed ĉar la favoro estas dia iniciativo, dia donaco.

Ĉar tio okazigis la doktrinon pri “fido kontraŭ agoj” de protestanta teologio, ĝi meritas detalan ekzamenon.

Unue, ni konsideru la referencojn de la Malnova Testamento, rapide. La citoj faritaj de Paŭlo ne ŝajnas bonaj, ĉar li “tordas” ilin malfacile. Sed ni denove memoru ke li nur obeis la kutimojn de sia epoko. Ni tute ne scias ke li rekte konis la hebreaĵajn tekstojn. Liaj citoj indikas ke li apogis sin per la

septuaginta traduko. Ni konas nur la ne nepre fidindan diron de Agoj ke Paŭlo ricevis formalan edukon en Jerusalemo; sed eĉ Agoj ne diras kion ni studis, kaj dum kiom da tempo. (Estas tute eble ke la verkinto de Agoj nur volis doni pli da prestiĝo al Paŭlo la Fariseo. Li tiel grandigas la miraklecon de la konvertiĝo. Tio povus esti motifo stimulantanta nehistorian pretendon ke Paŭlon edukis Gamaliel. Paŭlo fojfoje mem, en siaj leteroj, mencias siajn antaŭkristanajn jarojn, sed li neniam mencias Gamalielon.) Memorante tion, ni rajtas nomi Paŭlon senkulpa pri intenca mismanipulado de bibliaj tekstoj. Iukaze, “tordado” de bibliaj tekstoj ne estis peko en la klera mondo de lia epoko.

Paŭlo mencias la profeton Elija, de la 9a jarcento a.K. Elija estis Jahŭe-profeto kiu, domaĝe por li, publike aktivis en epoko kiam la dioj de Fenikujo egale ricevis oficialan honoron en Izrael kiel Jahŭe. Elija estis ekskluzivisto, kiu ne toleris la sinkretismon de Reĝo Ahab kaj Reĝino Izebel. Laŭ la rakonto, li murdis grandan grupon de sinkretismemaj profetoj, kaj poste sin kaŝis. Kaŝite, li iris al la Monto Horeb (kie Moseo unue renkontis Jahŭen) kaj tie plendis al Jahŭe ke nur li mem restas fidela, en la tuta lando. Jahŭe kritikis lin kaj atentigas ke restas ankaŭ 7000 aliaj.¹⁴²

Paŭlo duoncitas tekston de Readmono kiu efektive tekstas: “Sed Jahŭe ankoraŭ ne donis al vi menson por ke vi komprenu, aŭ okulojn por ke vi vidu, aŭ orelojn por ke vi aŭdu.”¹⁴³ Rimarku ke Paŭlo ŝanĝis la “vi” al “ili”.

Li ankaŭ citas, aŭ duoncitas, Psalmojn 69:22-23. (Paŭlo titolas la libron Psalmoj “David.”) En la psalmo mem, la aŭtoro pledas ke Jahŭe helpu lin kontraŭ malamikoj. Li petegas ke Jahŭe sendu katastrofon kontraŭ ili kaj blindigu ilin.

Paŭlo tiel tordas la citaĵojn ke ili prezentas Dion kiel la kaŭzon. Tiel, ne 7000 restas fidelaj, sed Jahŭe kaŭzas ke 7000 estu fidelaj. (Tre naiva maniero legi la tekston de 1 Reĝoj.)

Simile, li ignoras la diferencon inter “Dio ne donis” kaj “Dio malebligis.” La interpretoj indikas lian koncepton, ricevitan el la klasika hebrea teologio, ke Jahŭe estas la forto kiu kaŭzas ĉiun eventon.

Ĉu aŭ ne la citoj efektive subtenas la argumenton ne vere gravas multe. Li nur uzas ilin por esprimi celon: ke la homa agado ne povas transcendi sin. Ja estas homoj kun *dikaiosune*, homoj akordantaj kun Dio; sed nur ĉar Dio mem ebligis tion por ili. Ĝi estas donaco donita de Dio, kaj ne tio akirita per ilia strebado.

La historio malantaŭ tiu koncepto ne estas tuj evidenta. La instruoj en la Malnova Testamento estas, aŭ diras esti, plejparte rekte venintaj de Dio. Tio estas, ilin faras personoj kiujn Dio mem rekte kontaktis. Tiel, oni prezentas ke la Tora venas rekte de Moseo, kiu siavice ricevis ĝin de Dio. Ĉiu profeto, senescepte, pretendas raporti la vortojn de Jahŭe. Paŭlo insistas pri rekta sperto kiel la necesa fundamento por rilato kun Dio, kaj per tio li lokigas sin rekte en la tradicio profeta.

Sed Judismo ortodoksa, en la epoko de Paŭlo, havis tute alian karakteron. Ekstazia spertado ne plu estis idealo; oni opiniis ĝin abomeninda. Ni povas trovi spuron pri tio jam en la malfruaj partoj de la Malnova Testamento. Ekzemple, teksto en Zeharja (teksto verkita eble en la 2a jarcento a.K.):

Tiam, diras la orakolo de Jahŭe, mi forviŝos la nomojn de idoloj el la lando, kaj oni neniam plu memoros ilin. Mi ankaŭ detruos la profetojn, kaj la malpuran spiriton el la lando. Se iu iam denove profetos, liaj gepatroj diros al li: “Vi ne rajtas vivi, ĉar vi mensogas nome de Jahŭe.” Liaj gepatroj mortigos lin pro lia profetado. Tiam la profeioj hontos pro siaj vizioj kaj profetado. Ili ne plu aŭdacos surmeti longhar-mantelojn por trompi onin. Ili protestos “Mi ne estas profeto. Mi estas nur farmanto; ek de mia infaneco mi posedas terpecon.” Se oni demandas, “Do kial vi portas

vundetojn sur viaj ŝultroj?” li respondos, “Ĉar mi batigis en la domo de amiko.”¹⁴⁴

En la ortodoksa Judismo de la epoko de Paŭlo, rekta religia sperto opiniigis vulgara kaj malinda. Tial ĉiu malfrua verko de la juda religio atribuiĝis al la fruaj profetoj por akceptiĝi. Fine, oni formis la dogmon ke inspiro ĉesis en la epoko de Ezra (6-5a jarcentoj a.K.).¹⁴⁵ La plej granda parto de la Malnova Testamento, verkita post la 6a jarcento a.K., kaj multaj aliaj verkoj ne en la Malnova Testamento atribuiĝis diversmaniere al aprobatataj figuroj de la pasinta historio: David, Solomon, Jesaja, Jeremia, Moseo, Zeĥarja kc. Oni aldonis la novajn verkojn al la malnovaj verkoj, aŭ simple metis la faman nomon super la novan verkon.

Do, kvankam la religio de la Malnova Testamento estas fido kiu konsistas el rekta religia sperto pri la spirito dia, la religio de la epoko de Paŭlo estis pli “respektinda,” intelekta afero: oni akceptas parolajn deklarojn transdonitajn el la pasinteco. Tute sama afero okazis rilate al la Nova Testamento, kompreneble. Paŭlo instruis fidon kun la senco ke fido estas rekta sperto pri la dia spirito; laŭ li, tio estas la sola valorajo. La dua generacio de Kristanoj instruis fidon kun la senco ke fido estas akcepto pri diraĵoj de Paŭlo, Jesuo, kaj aliaj pli fruaj aŭtoritatuloj. Tion ni trovas eĉ en la Nova Testamento mem, speciale la plej malfruaj partoj (Evangelio laŭ Johano, Epistoloj de Petro, Jakobo, kc).

En la epoko de Paŭlo la juda instruado preskaŭ forgesis Dion favore al etika prezento. Kelkaj malfruaj partoj de la septuaginta verzio estas tre krudaj:

Infano, ĉiam memoru Jahŭen, nian dion, kaj klopodu ne peki aŭ malobei liajn ordonojn. Sekvu dikaiosune dum via tuta vivo, ne sekvu malbonajn vojojn. Se vi faras bonon, sukceso ĉiam estos via. Almozojn donu laŭ via havaĵo al ĉiu honestulo, ne domaĝu almozojn. Ne turnu vin de iu ajn

*malriĉulo, sekve Dio ne turnos sin de vi. Donu almozojn laŭ via havaĵo. Se vi ne havas multon, do ne timu doni proporcie al kiom vi havas. Tiumaniere vi faras por vi kapitalon utilan por kiam vi bezonos ĝin. Ĉar almozdono povas savi vin de Morto kaj povas nebligigi ke vi eniru Mallumon.*¹⁴⁶

Sed tia teksto estas escepta, kaj ne kutima. Multe pli tipa estas la supozo ke studo pri la Biblio kaj ĝustaj kredoj kontentigas Dion.¹⁴⁷ Ekzemple:

*Benata estas la homo...kies intereso estas la Tora de Jahŭe, kiu meditas pri ties Tora tage kaj nokte.*¹⁴⁸

*Sed rilate al nia popolo: se iu nur demandas al iu el ili pri niaj leĝoj, tiu pli volonte deklamas ĉiujn ol diri sian propran nomon, kaj tio estas la sekvo de la fakto ke ni lernis ilin tuj kiam ni kapablis konscii pri io ajn; ili estas kvazaŭ gravuritaj sur niajn animojn.*¹⁴⁹

La plej etaj detaloj de la Biblio ŝajnis tiel gravaj ke:

*Multaj Izraelidoj restis firmaj kaj plene rifuzis manĝi ion tabuan. Ili preferis morti ol malpuriĝi per manĝaĵoj aŭ profanigi la sanktan interligon. Tial, ili mortis.*¹⁵⁰

La koncepto estas, kompreneble, ke Dio faris serion de reguloj kaj insistas ke oni plenumu ilin. Kvankam estas malfacile trovi tekstojn en kiuj judaj verkantoj esprimas la vidpunkton ke oboe al la reguloj estas la sola necesaĵo, ili ja emfazas ke oni ne povas ricevi la favoron de Dio se li samtempe intence malobeas liajn ordonojn. (Komparu la diron de Jesuo, “Kial vi nomas min ‘Mastro, mastro!’ sed ne faras kion mi ordonas?”¹⁵¹)

Kvankam Paŭlo ne rekte neas ke Jahŭe faris ordonojn, li deklaras ke ili ne aplikeblas al iu ekster la juda grupo.¹⁵² Laŭ li, Dio ne estas leĝ-donanto, faranto de reguloj kaj postuloj. Kiam li (malofte) eksplicite diras ke kristano devas obei ian postulon, li kutime diras ke ĝi estas postulo de naturo mem

(aŭ foje, de Jesuo).¹⁵³ Tio konformas kun la interniĝo de Dio en la vidpunkto de Paŭlo. Reguloj kaj postuloj venas el ekstere. Nun ni havas novan epokon, kiam reguloj kaj postuloj malaperas, la epoko kiun celis la profetoj. Ni tamen ofte trovas ke Paŭlo mem ne ĉiam evitis la tenton fari regulojn por aliaj personoj.

Saviĝo rezultas ne el agado sed el fido. Per pli modernaj terminoj: integriĝo rezultas ne el ekstraverta okupiĝo pri la mondo sed el interna integriĝo de la konfliktantaj faktoroj.

La resto de la ĉapitro de Paŭlo konsideras la relativajn poziciojn de la judo kaj nejudo laŭ la dia vidpunkto. La centra temo estas emfazo ke la nova kristana erao ne estas aparta de la malnova juda erao. Izrael restas la popolo de Dio, la unike favoritaj, kaj kvankam nejudoj estas akceptataj tio ne nuligas la centran pozicion de judoj. Grupe ili estas ŝajne for de la dia favoro, tiel ke aliaj ricevas oportununon, sed iam ili grupe inkludiĝos. Per tio li volas diri ke Judismo konservis por ni tradicion pri kiu kaj kia estas Dio. Se oni estas juda, oni ne per tio ekskludiĝas el la dia favoro, kaj oni ankaŭ ne nepre inkludiĝas.

Romanoj: Ĉapitroj 12-13.

Ĉapitro 12 konsideras, parte, temojn pli detale pritraktatajn en la responda ĉapitro de 1 Korintanoj. Mi rezignas detale komenti ĉi tie. La ĝenerala senco estas ke la rezulto de fido estas akordigi kristanon kun Dio. Laŭ la frazo de Paŭlo, “ŝanĝiĝi per mensa renoviĝo.”¹⁵⁴ Ĉiu persono havas proprajn karakterizaĵojn kaj kapablojn, kiujn li saĝe utiligu.

Paŭlo proksimiĝas al la fino de sia letero. Lia verkado montras resumadon. Li diras aferojn kiuj tre similas al diraĵoj de Jesuo en la evangelioj. Efektive, ili eble estas memoroj pri tiuj diroj (inverse, la diroj en la evangelioj eble estas atribuitaj al Jesuo sed originis aliloke).

Post pluraj moral-diroj, Paŭlo konsideras temon tre interesan por la legantoj de tiu epoko: rilatoj kun la registaro. Tio ankaŭ interesis aliajn verkantojn de la Nova Testamento. Paŭlo havis tre pozitivan sintenon al la Roma Imperio, kaj la sama sinteno estas raportata pri Jesuo en la evangelioj.¹⁵⁵ Se la evangelia tradicio estas fidebla, estas klare ke Jesuon ekzekutis la provinca registaro roma pro ŝtatperfido.¹⁵⁶ La evangelioj strebas demonstri ke la ŝtatperfido ne ekzistis, sed estis inventaĵo de falsatestantoj.

Laŭ la opinio de Paŭlo, la registaro havis dian originon. “ne ekzistas aŭtoritato krom de Dio; kaj tiuj kiuj ekzistas estas starigitaj de Dio.”¹⁵⁷ Tiu motivo estas studita, rilate al la Malnova Testamento, de pluraj kleruloj, ekz. Sigmund Mowinckel kaj S. H. Hooke.¹⁵⁸ Ni ne povas detale penetri la temon nun. Mallonge, en la antikva Proksima Oriento oni opiniis ke reĝoj havas ian lignon kun la dioj, kvankam la detaloj variis. En Egipto oni kredis ke la reĝo estas la dio Osiro enkarna. En Mesopotamio oni opiniis ne ke la reĝoj estas enkarnaj dioj sed vikarioj de dio, kun senco simila al la koncepto romkatolika ke la papo estas la vikario de Kristo.

Okazis tre vigla, ofte pasia, debato pri ĉu la popolo de Judujo aŭ Izrael iam opiniis sian reĝon dia, sed efektive temas pri la semantika demando, kion signifas la vorto dia? En pluraj partoj de la Malnova Testamento, la reĝo de Judujo, Izrael, aŭ de alia nacio estas alparolata kun diecaj vortoj.¹⁵⁹ La registaron de la nacio oni supozis die establita, kaj oni kredis ke la pluekzisto de la registaro dependas de Dio.¹⁶⁰ Ne nur Izrael-Judujon; ankaŭ aliajn naciojn oni opiniis establitaj tiel de Jahŭe. Tio okazis post kiam filozofia monoteismo fariĝis regula en la hebrea teologio.¹⁶¹ Kompreneble, “la dia rajto de reĝoj” estas familiara eĉ por niaj oreloj; kaj eĉ en la 1940-oj la popolo de Japanujo opiniis sian reĝon dia. La absoluta transcendo de Dio, kiu karakterizas la norman teologion kristanan, tute ne karakterizas religiojn

ĝenerale, kaj ne la popularan judan aŭ kristanan teologion.

Sekve, Paŭlo nur esprimis ion ĝenerale akceptatan en lia epoko, kiam li komentis ke la regantaro estas de Dio aprobita. Li ilustris tiun kredon, laŭ Agoj, per agoj propraj. Post akuzo ke li faris krimon, li donis sin al la roma tribunala sistemo, certa ke la sistemo juste agos pri li.¹⁶²

Paŭlo mem parolis nur pri la registaro roma. Li tute ne konis alian specon de regado ol monarkio, kaj malfacile imagus kia estus alia sistemo. La motivo por liaj diroj pro obeo al registaro estis ligita al la koncepto pri la mesio. Laŭ la tradicia juda konceptaro, la mesio estis termino aplikata al sopirata reĝo kiu reaŭtonomigos Judujon. Estas klare per diversaj partoj de la Nova Testamento ke oni anticipis, ofte, ke Jesuo estos politika reganto.¹⁶³ Inter la kolegoj de Jesuo estis unu kiu laŭŝajne partoprenis revolucian movadon.¹⁶⁴ Judaj grupoj komplotis ribeli kontraŭ la provinca registaro roma en Palestino, intencante establi propran monarkion. Ne multajn jarojn post la Letero al la Romanoj la revoluciaj planoj publike manifestiĝis. Apenaŭ naŭ aŭ dek jarojn post la Letero, revolucio okazigis kvarjaran militon kiu detruis Judujon. Do estas kompreneble ke en letero intencata speciale por judaj kristanoj Paŭlo emfazas ke kristano devas esti lojala al la Imperio.

En verso 7 Paŭlo aludas al la diro atribuita al Jesuo en la Evangelioj: “Redonu al Cezaro la propraĵon de Cezaro kaj al Dio la propraĵon de Dio.”¹⁶⁵ La situacio en la perikopo evangelia estis: oni provis ĉu Jesuo rekomendas ribelon kontraŭ la Imperio per rifuzo akcepti ke la registaro rajtas imposti. Post ekzameno je monero, kaj interakordo ke sur la monero, estas bildo kaj vortoj de la Imperiestro, Jesuo komentas ke evidente la monero apartenas al la Imperiestro kaj li rajtas peti ke oni redonu ĝin. Nur kio apartenas al Dio estas rifuzenda al homoj.

Malakceptante la judan insiston havi propran reĝon, Paŭlo daŭrigas la tradicion ke Jesuo mem malakceptis ĉian politikan karakteron. La mondo ĉirkaŭ ni ne estas iluzio, nek io timinda. Ĝi ekzistas kun propraj rajtoj. Tio signifas ke oni devas serioze konsideri la homan ekziston kaj homajn rajtojn, kaj ne senpense dediĉi sin “nur al la volo de Dio.” Sekve, impostoj kaj aliaj “mondaj aferoj” estas legitima fenomeno en la mondo, kaj problemoj kiujn oni ne rajtas ignori.

Proksime al la fino de la ĉapitro Paŭlo parolas pri amo, kiun li multe pli detale diskutas en 1 Korintanoj.

Paŭlo, kompreneble, ne inventis la “resumon de la Tora” kiu diras “amu vian proksimulon kiel vin.” En la Nova Testamento oni diversloke atribuas ĝin al Jesuo kaj al aliaj personoj, kaj oni trovas ĝin ankaŭ ekster la Nova Testamento.

La ĉapitro finas per aludo al la aktuala krizo, temo kiu ankaŭ estas pli bone ekzamenebla rilate al 1 Korintanoj. Paŭlo estis konvinkita ke la fino de la mondo estas proksima. Kristanoj sekve devas preti kaj ne dediĉi sin al aliaj aferoj.

Romanoj: Ĉapitro 14.

Se ni seriozas ke ne ekzistas reguloj, ĉar Dio ne estas regul-faranto, konsekvencoj nepre ekzistas. La ekzemploj uzitaj de Paŭlo ankoraŭ nun validas: 1. La manĝaĵoj de personoj ne rilatas al ilia fido. 2. Observado de “sankta tago” ne rilatas al fido. 3. La trinkaĵoj de personoj ne rilatas al ilia fido.

Malakcepto je tiaj reguloj tute ne estis originala koncepto de Paŭlo. Ĝin elokvente proklamis en la Malnova Testamento profetaj verkoj, ekz. de Jesaja. Preskaŭ ĉiu profeta verko inkludas kondamnon pri sanktaj tagoj, oferoj, kaj aliaj

ritoj, eĉ kvankam tia kondamno ne estas tipa pri la tuta verkaro.¹⁶⁶ Kompreneble, ankaŭ ekzistas aliaj tekstoj en la Malnova Testamento favorantaj la ritojn.

La instruo de Paŭlo estas permesa: ĝi denove uzas temojn renkontatajn pli detale en 1 Korintanoj. Se iu opinias ke iu tago estas apartigenda kiel sankta tago, do bone. Se alia persono ne distingas inter tagoj, ankaŭ bone. Simile pri manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Sekve, la sanktan tagon (sabato) judaj kristanoj povis observi, kaj nejudaj kristanoj povis ne observi ĝin, laŭvole. En la situacio menciata en 1 Korintanoj temas pri manĝaĵoj dediĉitaj al “fremdaj dioj.” En Romanoj la situacio estas probable pli simpla, la judaj manĝaj-ritoj.

La klasika juda religio observis tre detalan serion de manĝ-tabuoj.¹⁶⁷ Tiujn tabuojn detaligis pli kaj emfazis post-ekzilaj instruantoj. En la epoko de Paŭlo, kiel dum la moderna epoko, la ortodoksa judo distingiĝis per granda ritario rilatanta al la preparado kaj manĝado de manĝaĵoj. Ni lernas per Galatoj ke la furiozo kiu estiĝis inter Petro kaj Paŭlo (nur aludo estas en Agoj, kiu prezentas la disputon inter Paŭlo kaj Barnabas sed kaŝas la kaŭzon, kiun donas Galatoj), kaj inter Paŭlo kaj Barnabas okazis pro la tabuoj. Petro kaj Jakobo, kaj evidente la aliaj “patroj” de la kristana kongregacio en Jerusalemo rifuzis manĝi kun nejudaj membroj. Sekve la manĝ-tabuoj de Judismo kaj ilia konflikt-kaŭzado multe okupis la menson de Paŭlo.

Ĝenerale, la tabuoj temis pri viando, kiun la klasika Judismo opiniis speciala. Ĉar viando originas en vivanta besto, ĝin oni opiniis speciale sankta. Viando estis la materialo *par excellence* por oferoj, kvankam oni povis fari legomoferojn. Buĉado, kio signifis mortigi, estis religia afero en la tuta mondo antikva. Interese estas ke oni tiam ŝajne ankoraŭ ne klare konceptis ke ankaŭ plantoj vivas, kaj ankaŭ ilin oni mortigas.

Judo loĝanta en Romo eble malfacile akirus viandon el bestoj buĉitaj laŭ la judaj ritoj. Estante kristano, li eble plu supozus ke la tabuoj validas, kaj, anstataŭ manĝi tabuan viandon, tute rifuzus manĝi viandon. Nejudo, kutimanta manĝi viandon aĉetitan en la butikoj, tute ne sentus ian ĝenon.

Paŭlo donas la instrukcion poste atribuitan al Petro¹⁶⁸ kaj al Jesuo,¹⁶⁹ ke nenio estas tabua. La vorto tradukita “malpura” estas pli adekvate tradukata “tabua.”¹⁷⁰ Ĝi havas longan historion en la Tora, kaj tute ne rilatas al higieno. Oni interesas sin ne pri la manĝaĵo, kies karaktero ja estas neŭtrala, sed pri la manĝantoj. La vidpunkto de la manĝanto, ne la karaktero de la viando, gravas. Tio prezentas gravan stadion en la evoluo de la pensaro de Paŭlo, kaj estas radikala breĉo inter li kaj la ortodoksa juda teologio. Efektive, ĝi proklamas la relativecon de sankteco. Kio estas sankta aŭ tabua dependas de onia vidpunkto. “Kiu estas sendecida estas kondamnita se li manĝas, ĉar li manĝas ne el fido, kaj ĉio kio ne estas el fido estas peko.”

Mallonge, tio resumas la tutan vidpunkton de Paŭlo, esprimitan en Romanoj. Religio ne estas objektiva, ekstera fakto sed subjektiva, interna vidpunkto. Tiu vidpunkto, siavice, estas preteco akcepti la internan forton kiun Paŭlo nomis Dio.

Romanoj: Fino

Estas ĝenerale akceptate ke la dua parto de ĉapitro 15 kaj la tuta ĉapitro 16 ne estas aŭtentika parto de la letero. Ili estas ekzamenendaj aparte. Do, por ni nun, Romanoj trovas sian finon je verso 13 de ĉapitro 15.

Paŭlo finas sian leteron per citoj el la Malnova Testamento. Ilia celo estas resumi unu penson: Kristo estas la vera plenumo de la promesoj faritaj al la antikvaj prapatroj

Epistolo al la Romanoj

La lasta cito, verso 12, estas el Jesaja 11:10, citita laŭ la septuaginta verzio. Jam kiam oni faris la Septuaginton, oni opiniis la tekston mesia, do la septuaginta teksto varias multe pro sia reverkiĝo fare de la tradukantoj. La hebrea teksto, uzita por niaj verzioj de la Malnova Testamento, parolas pri Reĝo Zerubabel.

Notoj

1. Kp. F. W. Beare, "Letter to the Romans," en *Interpreter's Dictionary of the Bible* (I.D.B.), vol. R-Z, p. 114.
2. Detala priskribo pri tiuj jaroj troveblas en Josephus: *La Juda Milito*.
3. Kp. Marko 5:1, 7:24, 26; Luko 7:2-10.
4. Kp. Marko 16:15; Luko 24:47; Mateo 28:19; Johano 3:15, kaj aliajn aludojn ke la laboro de Jesuo ne estas limigita al nur hebreoj.
5. Agoj 21:37, 40. "Hebrea" estis la tiuepoka nomo por la arama lingvo.
6. Marko 5:41, 7:34, 15:34 = Mateo 27:46.
7. Psalmo 22:1 (21:2 laŭ la katolika nombrosistemo).
8. Agoj 6:1-6.
9. Laŭ kalkulo donita de Reĝo Sargon II. V. en James B. Pritchard (red.): *The Ancient Near East*, Princeton, 1958, p. 195.
10. Laŭ Jeremia 52:28-30.
11. Jen emfazo de Readmono, kiun oni datas je 620 a.K. proks. Pri la templa situacio, v. R. de Vaux, *Les Institutions de V Ancien Testament*, vol. II, ĉapitro V, Parto IV, Paris, 1960.
12. V. I. Sonne, "Synagogue," en I.D.B., vol. R-Z, p.477-491.
13. V. M. H. Pope, "Proselvte," en I.D.B., vol. K-Q, p.921-931.
14. Bona ekzemplo estas la verkoj de Philo (20a.K.-50p.K.).
15. Memoru la diron de Jesuo, Mateo 23:15: "Vi transiras la maron kaj la teron serĉante proseliton, kaj trovinte vi faras lin duoble tiel preta por la infero kiel vi mem."
16. Agoj 6:5, 9:27, 13:43.
17. Mateo 5:47, Agoj 11:3, 21:28.
18. Agoj 13:43, 48, 14:1, 17:4, 12, 17, 18:4, kc.
19. Mateo 5:17-19, 10:5.
20. Agoj 21:20-24; Galatoj 2:11-14.

21. Romanoj 1:16.
22. Tio estis kutima en lia epoko. V. Liddell kaj Scott, *A Greek-English Lexicon*, red. Jones kaj McKenzie, Oxford, 9a eld., 1940, p. 536.
23. Kp. Psalmo 115:3-8 (katolika: 113:10-16), 135:15-18 (kat.: 134:15-18); Jeremia 51:47.
24. “La Potenculo de Jakob” en la hebrea teksto estas “la virbovo de Jakob” en Genezo 49:24, Jesaja 49:26, 60:16, Psalmo 132:2, 5 (kat.: 131:2,5). En Psalmo 78:25 (kat. 77:25) “virbovoj” estas eŭfemisme tradukita “potenculoj.” Pri la virbov-statuo, vidu 1 Reĝoj 12:28, 32; ankaŭ Eliro 32:4, 8, Readmono 9:16, 2 Reĝoj 10:28-29, Hoŝea 8:4-6, 13:2.
25. Vidu speciale Jesaja 45.
26. Kp. Psalmo 106:36 (kat. 105:36), kaj speciale Daniel 14 (kat.).
27. Simpatia diskuto pri la signifo de plastikaj reprezentaĵoj, kaj la reago kontraŭ ili, troveblas en Evelyn Underhill, *Worship* (Fontana represo 1962), speciale p. 46-50. Estas dubinde ĉu iu matura religio prave povus nomiĝi idolatrio.
28. Agoj 9:3-9. Vidu ankaŭ 22:6-11, 26:13-18.
29. Galatoj 1:16; 1 Korintanoj 15:5-8.
30. Resumas la antikvajn atestojn pri tio Henri Frankfort, *Ancient Egyptian Religion*, New York, 1948, ĉapitro 1.
31. Michael Fordham, “The Relevance of Analytical Theory to Alchemy, Mysticism, and Theology” en *Journal of Analytical Psychology* (= J.A.P.), 1960, vol. 5, p. 116-117.
32. Vidu la simpatian diskuton en Sigmund Freud, *Moses and Monotheism*, parto III, sekcio II, ĉapitro 4. Mi uzas la vorton “libido” laŭ Junga senco.
33. Vidu Donald Broadribb, “Carl Jung kaj la Biblio” en *Biblia Revuo* 1, 1964, speciale p. 24-25.
34. 1 Reĝoj 14:24, 15:12, 22:46, kc.
35. Readmono 23:18. (La hebrea diras “de hundo”).
36. En la P-dokumento, ĉ. 500-450 a.K. Vidu Levidoj 18:22,

- 20:13.
37. 1 Kornutanoj 11:10-16.
 38. Romanoj 1:32.
 39. Resumo pri aktualaj teorioj pri la evoluo de la Pentateŭko estas trovebla en H. H. Rowley (red.), *The Old Testament and Modern Study*, Oxford, 1951, ĉapitro III.
 40. La jam menciita verko de De Vaux bone ilustras la evoluon.
 41. Robert Etienne (Stephanus), 1551, respondecas pri nia aktuala divid-sistemo, kiel ankaŭ por la divid-sistemo en aliaj klasikaj verkoj.
 42. V. Erich Neumann, *Ursprungsgeschichte des Bewusstseins*, Zurich, 1949; angla eldono, *The Origins and History of Consciousness*, New York kaj London, 1954; parto II, sekcio A.
 43. Jeremia 31:31-34.
 44. Malahi 1:11. La hebrea teksto tute klare montras ke oni devas interpreti "estas" kaj ne "estos" en la cito.
 45. V. la diron en la *Libro de Disciplino de la Komunumo ĉe Qumran* pri tio, kaj la komenton de Vermes, en G. Vermes, *The Dead Sea Scrolls in English*, Penguin Books, 1962, p. 34, 72.
 46. Romanoj 2:13.
 47. Jen la socia bildo en la libro Juĝistoj.
 48. Readmono 30:15-20.
 49. George E. Mendenhall, *Law and Covenant in Israel and the Ancient Near East*, Pittsburgh, 1955 (ankaŭ en *The Biblical Archaeologist*, volumo 20, 1954, p. 26-46, 49-76).
 50. Sigmund Freud, *Group Psychology and the Analysis of the Ego*, London, 1922. (Germana originalo: *Massenpsychologie und Ich-Analyse*, Leipzig, 1921.) Represo en Bantam Books eldono, New York (1960), p. 81.
 51. C. G. Jung, *Symbols of Transformation*, p. 224. (En la Kolektita Verkaro, volumo 5. Germana originalo: *Symbole der Wandlung*, Zurich, 1952.)
 52. Pri la simbolismo de cirkumcido, vidu Robert F. Hobson,

- “Psychological Aspects of Circumcision,” en *J.A.P.*, volumo 6, 1961, p. 5-33.
53. Vidu J. P. Hyatt, “Cirkumcido,” en *I.D.B.*
54. Vidu J. Gray, “The Hebrew Conception of the Kingship of God,” en *Velus Testamentum*, volumo 6, 1956.
55. Kathleen M. Kenyon, *Archaeology in the Holy Land*, London, 1960, p. 37.
56. C. G. Jung, “On Psychic Energy,” p. 43 en volumo 8 de la Kolektita Verkaro.
57. Ekz. Romanoj 2:18,20,25; 3:1-4; 11:24; ke Paŭlo ĉiam citas el la Tora por subteni siajn asertojn estas indiko pri la alta valoro kiun li atribuis al ĝi.
58. Platono, en *Leĝoj*, demonstras al ni tre klare ke en lia epoko oni supozis ke militado estas nepre okazenda ĉiam.
59. Platono, en *Leĝoj* libro 10, klare argumentas tiel: kio moviĝas estas vivanta; kio vivas havas psikon; kio havas psikon estas simila al homo. Ĉiu moviĝanta objekto natura estas dio, kun konscio kaj celoj.
60. Levidoj 26:3-10, 14-39.
61. Vidu Helmer Ringgren, *Sacrifice in the Bible*, London, 1962, p. 35, por ekzemplo.
62. Tiun vidpunkton fervore kondamnis Platono en *Leĝoj*, libro 10.
63. Plorkanto 5:19-22.
64. Jesaja 40:24, 41:17-19; Genezo 1; Ijob 38; kc.
65. 1 Johano 4:8.
66. Ekz. en 1 Samuel 15:22.
67. Ekzemple: 2 Samuel 24:1, komparu kun la revizio farita jarcentojn poste en 1 Kroniko 21:1. Por diskuto kaj pli da ekzemploj, vidu Carl Jung, *Answer to Job*, en Kolektita Verkaro vol. 11 (germana originalo: *Antwort auf Hiob*, Zürich, 1952).
68. Genezo 13:14-17.
69. Genezo 16.
70. V. Mateo 3:9.
71. La plej detala ekzameno pri ĉi tio rilate al la Biblio estas

- de J. de Fraine, S.J., *Adam et Son Lignage*, Desclé de Brouwer, 1959. Malpli longa studo estas de Aubrey Johnson, *The One and the Many in the Israelite Conception of God*, Cardiff, 1961, 2a eldono. Neumann, jam citita en noto 42, diskutas la psikologian kaŭzon de la fenomeno.
72. Vidu James Barr, *The Semantics of Biblical Language*, Oxford, 1961; kaj vidu la "Symposium of Opinion on the Subject of Language and Culture," en la *International Language Review* numero 7, 1957, kaj numero 16-17, 1959.
73. Kutime la Bibli-verzioj ne tradukas la nomojn en Genezo 10 (la "Tabelo de nacioj") sed lasas ilin netradukitaj. Tial oni trovas Javan anstataŭ Grekujo, Micraim anstataŭ Egipto, kc.
74. Juĝistoj 1:3. La hebrea teksto klare diras "la Kanaanido" kaj ne "la Kanaanidoj."
75. Juĝistoj 1:12-13.
76. Vidu la diskuton pri la hebrea socio en De Vaux.
77. Ekzemple vidu 2 Reĝoj 21 pri Manase, aŭ 2 Reĝoj 22:19-20 pri Joŝija.
78. Vidu Amos 2:4-5; Jeremia 14; Psalmo 21 (kat.:20); kc.
79. Simila teksto en Jeremia 31:29-30 estas ĝenerale opiniata kiel neaŭtentika.
80. Jeĥezkel 18:1-32, *passim*.
81. Jeĥezkel 33:10-20; Jeremia 31:29-30.
82. Genezo 2:5-3:24.
83. Jeĥezkel 28:12-19.
84. Pri la historio de la interpreto, vidu ekz. la artikolojn "History of the Interpretation of the Bible," en *Interpreter's Bible* vol. 1.
85. Vidu Hugo Rainer, "The Christian Mystery and the Pagan Mysteries," en *Pagan and Christian Mysteries*, red. Joseph Campbell, Harper Torchbooks, 1963, p.146-210.
86. Pri la evoluo de la egiptaj konceptoj, vidu Henri Frankfort kc, *Before Philosophy*, Penguin Books, 1949, ĉ. II-IV. Por distra prezento pri iniciigo en mister-kulton, vidu Apuleius, *La Ora Azeno*.

87. Vidu S. H. Hooke, *Middle Eastern Mythology*, Penguin Books, 1963.
88. Ĝis kiom oni konceptis ke la hebreaj reĝoj estas diaj estas diskutate detale en Sigmund Mowinckel, *He That Cometh*, Oxford, 1956, ĉapitro III.
89. Jeĥezkel 8:14.
90. Agoj 8:36-39.
91. Vidu la inversigon de la kreo, Jeremia 4:23-26.
92. Hebrea: Genezo 1. Egipta: vidu Henri Frankfort, *Ancient Egyptian Religion*, Harper Torchbooks, 1961, en la indekso s.v. *water*. Greka: vidu S. Toulmin kaj J. Goodfield, *The Architecture of Matter*, Penguin Books, 1965, p.51-53. Por ĝenerala diskuto, vidu Mircea Eliade, *Patterns in Comparative Religion*, London, 1958; aŭ por resumo nelonga, Mircea Eliade, *Images and Symbols*, London, 1961, p.151-160.
93. La historio de la mesi-koncepto estas detale studita dum la pasintaj kelkaj jaroj. Klasika estas la studo de Sigmund Mowinckel (noto 88). Malpli longa studo estas de Helmer Ringgren, *The Messiah in the Old Testament*, London, 1956. Ankaŭ tre utilaj estas la artikoloj en I.D.B., "Messiah, Jewish," "Son of God," "Son of Man," "Christ."
94. Malahi 3:1; 4:5-6.
95. 2 Reĝoj 2.
96. Romanoj 1:4.
97. Pri tio vidu la kleran artikolon de T.H. Gaster, "Resurrection" en I.D.B. Vidu en la sama verko ankaŭ la artikolon de O.A. Piper, "Life."
98. 1 Petro 3:18-19; 4:6.
99. V. Carl Jung, "The Psychology of the Unconscious," (Kolektita Verkaro vol.7), indekso, s.v. *immortality*.
100. 2 Petro 1-3; Johano 1:14-18.
101. Galatoj 1:15-16.
102. Jung unue formuligis ĉi tiun fakton en sia doktora disertacio "On the Psychology and Pathology of So-Called Occult Phenomena" (Kolektita Verkaro vol. 1. Originala: *Zur Psychologie und Pathologie sogenannter occulter*

- Phaenomene, Leipzig, 1902.) Simpla, kaj bone ilustrita, ekspliko troveblas en Carl Jung, red., *Man and His Symbols*, London, 1964.
103. 1 Korintanoj 13:18; kp. 12:7-11.
 104. 2 Korintanoj 5; 1 Korintanoj 15:51-58.
 105. Romanoj 5:19-21; 6:8.
 106. Vidu C. G. Jung, "The Mana-Personality" en "The Relations Between the Ego and the Unconscious," (en Kolektita Verkaro vol. 7), p.225-239.
 107. Romanoj 6:13.
 108. Tre bona kaj profunda studo pri ekstazio en la Kristana tradicio estas de Monsinjoro Ronald Knox, *Enthusiasm*, Oxford, 1950. Paŭlon li konsideras sur p.8-24.
 109. V. Sigmund Freud, *Jokes and Their Relation to the Unconscious*, London, eldono de 1960, ĉapitro IV; Platono, *Cratylus*.
 110. Readmono 31:24.
 111. Romanoj 7:14-25.
 112. "On the Nature of the Psyche" (Kolektita Verkaro, vol. 8), speciale p.176-177. Vidu ankaŭ Ira Progoff, *The Death and Rebirth of Psychology*, Delta Books, New York, 1964, p.164-177.
 113. Longe diskutita afero en *Memories, Dreams, Reflections*, London, 1963, p.302-312.
 114. "Personoj en Kristo Jesuo" estas kristanoj. Por detala diskuto pri la senco de la frazo, vidu J. de Fraine (menciita en noto 71) kaj Rudolf Bultmann, *Theology of the New Testament*, London, 1952.
 115. Romanoj 8:1-11. Mi tradukis *nomos* diversmaniere, laŭ la senco.
 116. Vidu *Answer to Job* (noto 67).
 117. La senco de *soma* (kaj *sarks*) estas detale diskutita en Rudolf Bultmann, *Theology of the New Testament*, London, volumo 1, parto 2, 1952. Sed Bultmann ŝajne ne konsciis ke la diskuto farita de Paŭlo ne estis originala, kaj li ne montras konscion pri la ĝenerala psikologia

- implikilo ekster la pure Paŭla diskuto.
118. Aristotelo, *Nikomachea Etiko*, libro 1, ĉapitro 13, 1102b. Aristotelo mem multe pruntis el Platono, *Respubliko*, 439-441, 588-589, kc. Vidu ankaŭ la fiziologian psikologion en Platono, *Timaeus*. Pri la stoika vidpunkto, vidu Seneca, *De Clementia*, 3.5.
 119. Genezo 6:2; Psalmo 29:1 (kat. 28:1); Psalmo 82:6 (kat. 81:6); Psalmo 89:7 (kat. 88:7); Ijob 1,38:7; vidu ankaŭ Readmono 33:2; Jesaja 6, 24:21; Jeremia 23:18,22; Psalmo 58:1,12 (kat. 57;2,12) kaj rimarku ke la hebrea teksto diras en linio 12 “Ekzistas dioj juĝantaj la teron”; Psalmo 103:21 (kat.102:21); Psalmo 148:2; Josuo 5:14; 1 Reĝoj 22:19; 2 Samuel 14:20; Ijob 15:15; eble Zeĥarja 14:5. Tiu dua grupo de referencoj temas pri diversaj diaĵoj, ne nur “filoj de Dio.”
 120. Vidu Luko 20:36; Johano 10:34-35.
 121. Agoj 22:3. Sed Paŭlo mem neniam aludas al la afero.
 122. Eliro 16:7,10, 24:17, 40:34-5; Nombroj 14:10; 1 Reĝoj 8:11; Jeĥezkel 1:28, 3:12,23, 10:4,18, 11:23, 43:4-5, kc.
 123. Genezo 25:23.
 124. Malaĥi 1:2-3.
 125. Genezo 25:30, kc.
 126. Romanoj 9:6-7.
 127. Eliro 21:1; Levidoj 18:1-5, kc. La identigo de justeco kaj ago de Dio estas tiel plena, ke ofte oni malfacile decidas ĉu la hebrea teksto celas unu aŭ la alian koncepton. Kp. Jesaja 42:6, 46:12, 56:1; Psalmo 103:6 kc. Vidu diskuton en James Muilenburg, *The Way of Israel*, New York, 1961, p.36-38.
 128. Eliro9:16.
 129. Jeremia 18:1-4.
 130. Jesaja 45:9; vidu ankaŭ Jesaja 29:16.
 131. T.e., la dio Ĥnum muldas homojn per sia pot-rado. Bildo en Pritchard (noto 9), numero 162.
 132. La hebrea teksto uzas ordinarajn vortojn kiel proprajn nomojn, por fari vortludon. Verzioj ofte ne tradukas la

- nomojn, kaj tial perdas la vortludon.
133. Hoŝea 1:2-8, 2:21-23.
 134. Amos 9:9-15; Joel 3; Zeĥarja 14; kaj multaj aliaj.
 135. Rimarku la sopiran demandon faritan al Jesuo en Agoj 1:6.
 136. *I.D.B.*, vol. E-J, p. 964.
 137. Miĥa 4:1-4; Jesaja 2:2-4.
 138. Listo en *I.D.B.*, s.v. "Stumbling Block."
 139. Bultmann (vidu noton 117) en volumo 1, ĉapitro 5, argumentas por ŝajne nur intelekta senco por la vorto *pistis*. Mi opinias ke Bultmann ne adekvate konsideris la mekanikon de "fido" en la sperto de Paŭlo.
 140. Readmono 30:12-13.
 141. Vidu Bultmann (noto 117), volumo 1, p.312.
 142. 1 Reĝoj 19:14-18.
 143. Readmono 29:3. La septuaginta kaj hebrea tekstoj estas samaj.
 144. Zeĥarja 13:2-6, nove tradukita. "Mi posedas terpecon" estas konjekta traduko de sensenca teksto.
 145. Vidu en 2 Esdras 14:44-45 (la vulgata teksto 4 Esdras 44-5 ellasas la specifan aludon al la malnovtestamentaj libroj); 2 Makabeoj 2:13; Josephu, *Apion*, I
 146. Tobit 4:5-11.
 147. Vidu W. D. Davies en *I.D.B.*
 148. Psalmo 1:1-2.
 149. Josephus: *Apion*, II. 19, citita de Davies (noto 147).
 150. 1 Makabeoj 1:62-63.
 151. Luko 6:46.
 152. Romanoj 3:19.
 153. Ekz. 1 Korintanoj 7:10,25, 11:14.
 154. Romanoj 12:2.
 155. Ekz. Marko 12:14-17 = Mateo 22:15-22 = Luko 20:20-26; Johano 18:36.
 156. Marko 15:2; Luko 23:2; Mateo 27:11; Johano 18:33.
 157. Romanoj 13:1.

158. Vidu Aubrey Johnson, *Sacral Kingship*; J. Morgenstern, "The King-God among the Western Semites and the Meaning of Epiphanes" en *Vetus Testamentum*, volumo 10, 1960, p.138-197; S. H. Hooke (red.): *Myth, Ritual, and Kingship*, Oxford, 1958; Sigmund Mowinckel, *Psalmenstudien*, parto 2, p.1-209, Kristania, 1922; same, *The Psalms in Israelite Worship, He That Cometh*; Ivan Engnell: *Studies in Divine Kingship in the Ancient Near East*, Uppsala, 1943.
159. Jehezkel 28:12-19, 43:7; 2 Samuel 14:17,20, 23:2; Psalmo 2:6-7, 21:5 (kat. 20:5), 45:6 (kat. 44:7), 72:5 (kat. 71:5), 110 (kat. 109), kc.
160. 1 Samuel 10:1, 16:1; 2 Samuel 7:8, 11,12-13.
161. Amos 9:7; Jesaja 45:1-3; Genezo 21:18, 35:11.
162. Agoj 25:10-11.
163. Agoj 1:6; Marko 11:10 kaj paraleloj; Apokalipso 17:14.
164. Simon Zeloto ("la Fervorulo"). Vidu *I.D.B.*, s.v. Simon.
165. Marko 12:17 kaj paraleloj.
166. Amos 5:23-24; Jesaja 1:11-14; Miĥa 6:6-8 (kp. 1 Samuel 15:22-23); Hoŝea 6:6; Jeremia 7:21-22; Psalmo 40:6 (kat. 39:7); Psalmo 51:15-17 (kat. 50:18-19) — la postaj linioj de tiu psalmo ne estas aŭtentikaj.
167. Readmono 14:3-21; Levidoj 11:2-47.
168. Agoj 11:1-18.
169. Marko 7:19.
170. Vidu mian *Beginning Biblical Hebrew*, Melbourne (Univ. of Melbourne, Dept. of Semitic Studies), 1965, paraĝo 214.